

Kazimjeĵ Ŝĉurek

Ĉaso je rememoroj

*Al miaj geamikoj
dankeme*

Laŭte!

Cercle amical espérantiste
FR-47470 Beauville
2000



G.B. Šoŭ (Shaw) **Pigmalion**. E. Semanova kiel Eliza
(Vd. ĉapitron: "Tespisidino", p.35/52)

Al la legantoj

En nia ĝardeno kreskas pomarbo. Aĝa ĝi estas, larĝa, kun branĉoj formantaj ombrozan kupolon. Dum varmaj tagoj ĝi fariĝas milda ŝirmejo en kiu eblas trankvile mediti, foliumi libron, babili kun amikoj, kiuj - cetere - preferas ĝui tiun naturan ombrejon ol sidi en ĉambro.

Kion povus rakonti la pomarbo, se ĝi kapablus paroli! Seriozajn konsiderojn kaj spicajn anekdotojn, klaĉojn virajn kaj virinajn kaj freŝajn sciencajn atingojn, impresojn pri libroj eldonitaj kaj sugestojn pri eldonindaj, babilojn bibliofilajn kaj frandemulajn, kaj ankoraŭ cent diversajn aferojn kaj aferetojn. Fluas tempo, alternas vizaĝoj, la pomarbo staras kaj aŭskultas, kaj mi supozas, ke eĉ dum pluvaj tagoj ĝi gvas al la fenestro, trans kiu ni sidas en la ĉambro, kaj subaŭskultas nin.

Eble ĝuste el inter la folioj venadis tiuj obstinaj sugestoj, kiuj tiklis mian menson: notu la interparolojn, almenaŭ parte! Tiom da interesaj homoj vizitas nin, tiom da pensoj naskiĝas! Kial ili forŝvebu senmemore?

Ideo, semita en menson, ne emas morti; kontraŭe, ĝi ĝermas, kreskas, kaj - konkretiĝante - postulas realigon. Fine do mi devis cedi.

Reviviĝis en la memoro homoj kaj eventoj, tra mia krajono ekdescendis sur paperon kaj jen ili troviĝas antaŭ vi, en sia modesta sed daŭra rezidejo - la libro. Interkonatiĝu kun ili. Eble vi renkontos tie ankaŭ viajn gekonatojn. Des pli bone, ja en amika rondo oni sentas sin plej agrable.

Revelacio

Estis frua junio de la 1958-a jaro kiam en liceon, en kiu mi instruis pri la pola literaturo, venis iu bulgaro.

- Estas redaktoro el Sofio, kaj li deziras renkonti nian junularon - diris mia direktoro, petante ke mi iru tien kaj gardu iomete la gejunulojn.

- Sed kiel ili interkompreniĝos?

- En Esperanto.

- En Esperanto? - mia miro certe estis tute videbla, ĉar la direktoro tuj aldonis: - Li venos kun tradukonto en la polan.

Mi diris nenion, iris en la indikitan salonon, tamen sur mia vizaĝo plu vagis iu mira, hezita rideto. Sincerdire, ĝis tiam mi aŭdis eĉ ne unu vorton en tiu enigma lingvo, sed se la gejunuloj volas, kaj la direktoro konsentas...

Ĉirkaŭ kvindekjara, granda, grizethara viro staris ĉe la katedro kaj observis la enirantojn. Apud li staris dua viro, pli juna, malpli alta, ankaŭ scivole rigardanta la kreskantan aŭskultontaron. Post kiam la salono pleniĝis kaj neniu plu venadis, la alta viro turnis sin al la juna publiko kaj ekparolis:

- Mia nomo estas Simeon Hesapĉiev, mi estas redaktoro en la sofia pedagogia eldonejo Narodna Prosveta, kaj mi venis ĉi tien ĉar mi tre deziris renkontiĝi kun vi. Sed ĉar en via urbo neniu konas la bulgaran lingvon, mi parolos al vi en la internacia lingvo Esperanto, kaj sinjoro inĝeniero Zdzislav Glajcar - jen li iomete riverencis al la dua viro - estos nia tradukanto. Mi parolos pri mia lando Bulgario, kaj poste vi povos demandi, pri kio vi nur volos. Mi klopodos respondi, se mi povos, memkomprene - li aldonis kun rideto.

La prelego daŭris iom pli ol horduonon, li parolis vere interese, do mi mem aŭskultis kun atento, sed ne tre kredante ke poste okazos diskuto. Je mia surprizo la gelemantoj reagis neatendite vigle, eĉ fervore. Demandoj fluis, la preleginto inteligente evitadis danĝerajn politikajn rifojn, la tradukanto interpretis lerte, oni apenaŭ sukcesis fini en konvena tempo. Sed ankaŭ post finiĝo kelkaj gejunuloj ĉirkaŭis la redaktoron, ne emante ĉesi.

Nu, tiutempe en Pollando vojaĝo eksterlanden estis preskaŭ neplenumebla revo, precipe por junularo, ĉar la socialisma reĝimo, ankoraŭ fortoplena, separis la civitanojn disde eksterlando, eĉ samreĝima. Kaj la gasto el Bulgario ripetis kelkfoje, ke la lingvo, en kiu li prelegas, estas pordo al la tuta mondo. Ĉu ne precipe la junajn homojn logas la enigma foro?

Post la prelego mi devis iri al miaj pluaj okupoj, do mankis tempo por pripensi la esencon de l' prelego, kaj - verdire - profunde ĝi ne impresis min, la balkanaj landoj iel ne estis por mi speciale allogaj. La viziton de la gasto mi traktis samkiel multajn similajn, ja en kleriga institucio ili ne estas raraĵo, kaj baldaŭ mi ne plu pensis pri ĝi. Tamen la sorto iel persistis ne disŝiri la delikatan fadenon per kiu ĝi ligis min en tiu tago kun la stranga vorto Esperanto.

Kiam mi iris hejmen tra la urbo kaj - laŭ permanenta kutimo - rigardis montrofenestrojn, jen trans la vitro mi ekvidis libron, kiu en aliaj cirkonstancoj eble ne interesus min, sed ĝuste la hodiaŭa tago estis escepto. **Jan Fethke: Podręcznik języka międzynarodowego esperanto***. Alflugis en mian kapon la prelego de la bulgara redaktoro, kaj la lingvo en kiu li parolis. Mi cerbumis kelkan tempon, rigardis la libron, kaj... per decidaj paŝoj eniris la librovendejon. Post minuto la libro estis mia.

Laŭ studoj mi estas filologo. Vereble** pro tio, post kiam mi ekfoliumis vespere la lernolibron, ĝia enhavo estis por mi absolute klara. Neniuj duboj, neniuj cerbumoj kio estas artikolo, adjektivo, afikso, partícipo aktiva aŭ pasiva... Terminoj, kiujn plejparto de homoj jam delonge ne plu memoras aŭ memoras tute svage.

Post unu tralego de la libro mi ekkonsciis ke la lingvo, pri kiu ĝi traktas, estas mirige logika, simpla kaj nekompareble pli facila ol la naciaj lingvoj. Decido ellemi ĝin estis jam natura sekvo de tiuj impresoj.

Tiel ĉio komenciĝis. Ekreginte baldaŭ la gramatikon, mi turniĝis al revuoj, preskaŭ samtempe al la literaturo, kaj post unu jaro mi konis jam ĝiajn multajn verkojn originalajn kaj tradukitajn. Ĉiu neofito estas fervora.

* Lernolibro de la internacia lingvo Esperanto

** vereble verŝajne, supozeble, eble.

Sed mi devas konfesi, ke en mia pli posta vivo mi ne fariĝis aganto en la esperantista movado. Ne ĉar mi ne aprezas ĝin alte, nek ĉar la movadan aktivadon mi opinias nebezona. Laŭ la karaktero mi ne estas socia aktivulo, mi simple ne kapablas agadi. Homoj havas diversajn mentalojn, la mia inklinis al libroj, al artoj, kaj precipe al literaturo - memkomprene, ne nur la Esperanta - kaj kun la libroj mi travivis du trionojn de mia vivo.

Dekdu jarojn mi instruis pri la pola literaturo en liceo, poste, ne plu povante elteni la absurdan politikan premon, kiun la komunisma reĝimo aparte intense aplikadis en la pola kleriga sistemo, mi decidis forlasi tiun profesion kaj transiri al biblioteko. La decido postulis ekstudi - en simpligita formo, ĉar oni grandparte agnoskis validecon de mia filologa diplomo - la bibliologion; ĉiujn koncernajn postulojn mi plenumis kaj akirinte la diplomon, mi eklaboris en biblioteko.

Ĉi tiu decido montriĝis unu el la plej trafaj en mia vivo. Mi ekpraktikis profesion, kiu fariĝis por mi ege ŝatata, eĉ amata, mi havis amason da libroj je mia dispono, mi povis facile uzadi la interbibliotekan pruntadon, la duan parton de la tago mi havis liberan ĉar mi ne plu devis korekti la gelemantajn taskojn, en la laborejo regis trankvilo kaj silento, nu la vivo, simple, perdis sian grizan koloron.

En tiaj cirkonstancoj mi komencis sisteman propran studadon kaj post kelka tempo oni ekopiniis min - pardonu mian van-tecon - aprecata konanto de la libro, kaj precipe de ties historio. Mi fariĝis tiu feliĉa homo, kies profesio kaj hobbio estas samaj.

Pasis ankoraŭ kelka tempo kaj mi ekprovis verki; Esperante, memkomprene, ĉar pole tio okazis jam pli frue. En "Pola Esperantisto" 1960/6 aperis **Oraj pensoj** - kelkaj aforismoj tradukitaj el verkoj de diversaj pensuloj. La sekvinta jaro alportis **Kelkaj konsideroj** koncernantaj la Esperantajn bibliotekojn, kaj tradukaĵon el deksepjarcentaj **Polaj ŝercaĵoj**. Tiuj tekstoj nun ŝajnas al mi tute negravaj, ili tamen komencis "la duan padon" de mia verkado - la esperantlingvan. Ekde tiam ĝis nun mi alterne prenas unu el la du plumoj kuŝantaj sur mia skribotablo - aŭ la polan, aŭ la Esperantan.

Disreviĝinta socialisto

Mi ne sukcesas rememori, en kiaj cirkonstancoj naskiĝis mia interkonateco kun Jan Zavada; tio okazis supozeble en la sesdekaj jaroj dum abiturienta renkonto en la liceo en kiu mi tiam laboris. Zavada kaj liaj samklasanoj de tempo al tempo organizis renkonton en sia iama gimnazio en Ciešin (Cieszyn), kvankam laŭ fluo de tempo la grupo pli kaj pli degeladis, komence de la sesdekaj jaroj ili restis nur kvin, ĉiuj sepdekjaruloj.

Lia unua letero al mi devenas el junio 1963, la lasta el julio 1971, intertempe kaj ankaŭ pli poste ni kelkfoje renkontiĝis, unu fojon li gastis ĉe mi kun sia edzino Maria. Dum tiu restado li tajpis en mia biblioteko rememorojn pri agado de la unua socialista rondo en la gimnazio, kiujn publikigis "Zaranie Slaskie" en 1972.

Zavada devenis el eta vilaĝo Kamešnica, sed kiam li havis kvin jarojn, la tuta familio translokiĝis al Karvina, ĉar en unu el multaj minejoj de tiu karboza regiono lia patro trovis laboron. La edukado de la eta Jan tre variis: li frekventis lernejon ĉeĥan en Orlova, poste polan en Karvina, poste germanan en Frištad, kaj fine polan gimnazion en Ciešin, kiun li povis frekventi dank'al tio ke du liaj instruistoj, Firla kaj Peňaček, decidis subvenciadi lin per 20 kronoj monate.

Li estis eksterordinare kapabla kaj jam kiel gimnaziano publikigadis artikolojn en diversaj gazetoj, precipe en "Silezia laboristo" kaj "Voĉo de la silezia popolo", sub pseŭdonimo Ludomil Bunt, ĉar la gazetoj havis karakteron socialisman, aŭ almenaŭ socialismeman, kaj tion la gimnazio rigardis tre malfavore, se ne rekte kondamne.

En siaj gimnazianaj jaroj Zavada proksime ligiĝis kun Tadeuŝ Reger, tre aktiva protagonisto de la regionaj socialistoj, redaktoro de "Silezia laboristo", posedanto de tre riĉa socialisma, radikala libraro, el kiu la junaj entuziasmoj povis libere elektadi, kaj fakte elektadis. Zavada baldaŭ iniciatis en la gimnazio fondon de unua socialista rondo kaj la anoj, sub gvido de far Reger komisiita juna juristo Mieĉislav Jaroŝ, ekstudis verkojn de Kautski, Marks, Engels

Lasal, kaj precipe la **Erfurtan programon**, apud la **Komunista manifesto** la plej popularan gvidlibron de la germana social-demokratio.

Iom pli poste la rondanoj eĉ lanĉis stencilitan revuon "Fajrero" ("Iskra"), kies plej fruaj kapteroj ili sendis en Parizon al Jan Hempel, kiu donadis al la junaj socialistoj redaktajn instruojn kaj konsilojn.

Zavada - laŭ sia propra difino - estis tiam "flamanta torĉo de l'socialismo". Pelate de interna imperativo agi, li fine de junio 1910 sen abiturienta diplomo forlasis la gimnazion kaj eklaboris kiel redaktoro - komence en "Ministo" ("Górnik"), pola gazeto de Sindikato de Ministoj en Aŭstrio, pli poste en "Teksa laboristo", gazeto de Asocio de Teksaj Laboristoj en Bielsko-Biala.

En la 1912-a jaro li forvojaĝis al Parizo, kaj restadis tie kelkajn jarojn, vivtenante sin per laboro ĉe lignaĵisto; tiam li realigis delongan deziron: ekkoni persone Jan Hempel.

Kompatinda Hempel! Li estis unu el la tragikaj personoj de la pola socialismo. Arda, radikala maldekstrulo, ĉiujn fortojn oferanta al la socialisma idearo, li faris preskaŭ ĉion: politikis, redaktadis, manifestadis, propagandis en- kaj eksterlande, nu, kaj "sidadis". Ĝuste pri li aludas poeto Vladislav Bronievski en sia versaĵo **Magnitogorsk laŭ interparolo kun Jan**, ĉar en la intermilita tempo ili "sidis" kune en la sama prizona ĉelo en Varsovio.

Por eviti laŭvican enkarcerigon, Hempel forkuris en Sovetan Union, vivis tie tre mizere tamen ne perdante fidon je socialismo. Liaj lastaj leteroj al la fratino diras, ke li suferas mankon de preskaŭ ĉio bezonata por normala vivo, sed kredas ke ĉio iom post iom pliboniĝos. Subite liaj leteroj ĉesis alvenadi. Longe daŭris la silento, ĝis fine oni eksciis, ke Hempel estis mortigita far stalinisma sekreta polico. Okazis tio dum la granda "purigo" stalinisma, kiam pereis interalie granda nombro da sovetaĵ generaloj kaj altrangaj oficiroj. Tiel la soveta socialismo premiis sian ardan, fidelan zeloton.

Kun Hempel Jan Zavada persone interkonatiĝis ankoraŭ antaŭ la unua mondmilito kaj ilia amikeco plu daŭris. Post kelkjara restado en Parizo Zavada, tra Zuriko kaj Vieno, tre lante ĉar kun ioma restado en ambaŭ urboj, revenis al Pollando kaj tie estis soldatig-

ita. Civiligita post unu jaro, li denove serĉis Hempel kaj trovis lin en Varsovio. Ĉi tiu urbo fariĝis jam lia ĝismorta loĝloko. Tie li laboris en Kooperativo de Konsumentoj, poste en Asocio de Laboristaj Kooperativoj, fine en la Kooperativo "Kune" ("Spolem"), kiel ĉefo de ties instrua fako. En la intermitaj jaroj oni lin arestis por kelka tempo pro kontaktoj kun la socialisma movado; li konatiĝis interalie kun Boleslav Bierut, post la milito la unua socialisma prezidento, ĉar ili ambaŭ laboris en laboristaj kooperativoj.

Kiam post la milito Bierut fariĝis prezidento de Pollando, li rememoris sian iaman kamaradon kaj donis al li altan postenon en la ministerio zorganta pri la kooperativoj, tiam tre grava pro reĝimaj kaŭzoj. Sed tio ne daŭris longe. Zavada, socialisto-idealisto, homo kun tre honesta moralo, ne taŭgis por konstrui tian socialismon, kiam oni konstruis en satelita Pollando laŭ instrukcioj el Moskvo. Li foriris al malpli gravaj postenoj, en la jam menciitan kooperativan movadon.

Al Hempel Zavada ŝuldas ankaŭ sian esperantistecon. Estas vero, ke Esperanton li renkontis unuafoje ĉe Reger, ĉar tien alvenadis ankaŭ esperantlingvaj radikalaj gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Reger klarigis la internacian lingvon, emfazis ties valorojn, Zavada ekinteresiĝis pri ĝi, eĉ aĉetis popularan lernolibron de Pfefer, eldonitan ĉe Cukerkandel en Zločov, sed forte emis unue finlerni la germanan, lerni la francan kaj la anglan, kaj nur poste la internacian. Esperanto do atendis, sed la decido ellerni ĝin foje ricevis fortan impulson.

Pri tio Zavada mem rakontis al mi dum unu nia interbabilo, kaj ŝajnas ke nur al mi, tial mi deziras fiksi tion per vortoj. Jen iun tagon li venis - laŭ antaŭa interkonsento - en vestiblon de pariza hotelo, por renkontiĝi kun Jan Hempel, kaj rimarkis lin staranta iom flanke kaj vigle interparolanta kun iu viro. Zavada haltis proksime kaj rimarkis, ke ili interparolas fremdlingve. Post kiam pli poste li demandis Hempel, en kiu lingvo ili interparolis, li ekaŭdis ke en Esperanto.

Hejme, rememorante tion, Zavada decidis: Se Hempel ellernis ĉi tiun lingvon, ankaŭ mi ellernos!

Ekreginte Esperanton ĉirkaŭ la 1921-a jaro, li baldaŭ eniris Esperanton kaj restis en ties pola plej vigla, esenca kerno dum sia

tuta vivo, nur tre rare interrompante sian aktivadon, se gravaj kaŭzoj postulis tion.

La polaj esperantistoj ricevis de li sian adresaron, lernolibrojn, vortarojn, multajn artikolojn en revuoj kaj enorman kontribuon al la asociaj laboroj, inkluzive la sekretariecon en la Universala Kongreso en 1959. La centjaran jubilean kongreson en Varsovio li ne ĝisvivis.

Tamen tiuj ĉi formalaj sciaĵoj ne sufiĉas por prilumi la escepte riĉan personecon de Jan Zavada. Li estis homo ege honesta, kaj tial, kvankam iama arda, radikala socialisto, post la dua mondmilito li baldaŭ forlasis la socialisman, regantan tendaron, kontentiĝinte per modesta, mezgrava posteno. Cetere, en lia mondkoncepto laŭ flo de l' tempo okazis gravaj ŝanĝoj. Dum la gimnaziana aĝo en li vibris agemo por socialisma ideologio, tiomgrade ke li lasis la lernadon nelonge antaŭ la abiturienta ekzameno kaj forveturis al Parizo, por tie agi kun Hempel, absoluta ateisto. Dum multegaj jaroj li ne nur legadis sed ankaŭ kolportadis, publike aŭ sekrete, la ateismajn revuojn "Sendependa penso" ("Myśl Niepodległa") de Niemojevski, "Libera vorto" ("Wolne Słowo") de Belmont, la radikale-kampanan "Voĉo de la silezia popolo" ("Głos Ludu Śląskiego"), kaj de la Hempel-aj **Polaj predikoj** kaj **Piastaj predikoj** - siaspeca "ateista biblio" - li publikigis ampleksajn fragmentojn, (pro kio riproĉis lin la distrikta ŝtata oficejo en Cieŝin, ke li "transpaŝas" la temaran linion de la redaktataj revuoj).

Havante jam sepdekon, li konfesis al mi dum amika babilo en mia ĝardeno:

- La plej profundan saĝon mi fakte trovas en la mezepokaj mistikuloj, kiujn mi nune studas.
- Vi malproksimen foriris de viaj junaĝaj konvinkoj!
- Malproksimen, sed supozeble ne estas mia elekto. Prefere regula fenomeno. Ateismo kaj radikalismo rare estas religio de maljunuloj.

Ĝuste en "Sendependa penso" Zavada, havante tiam 16 jarojn, trovis informon pri Jan Vantula, fandeja seruristo, eminenta aŭtodidakto kaj socia aganto; sendepende de tio pri Vantula aludis Hempel en iu sia letero. Sekve de tiuj informoj Zavada en

1907 vojaĝis al Ustron, por renkontiĝi kun tiu interesa homo, kaj ekde tiu tago ilia varma amikeco daŭris ĝis morto de Vantula en la 1953-a jaro. Ili interŝanĝadis rarajn presaĵojn, Zavada multfoje gastis en Ustron, kaj - laŭ liaj propraj vortoj - ĉiufoje admiris valoregan bibliotekon de Vantula, kun multaj blankaj korvoj.

- Konkeris min - rakontis al mi Zavada - liaj multaj kontaktoj kun verkistoj kaj elstaraj sociaj agantoj, lia kono de la regiona folkloro, sed ĉefe lia enorma laboremo.

Tamen, ankaŭ ilia amikeco ŝanĝis iom post iom sian koloron - la ruĝa tre paliĝis, la pasea alloga forto de socialismo febliĝis kaj ŝanĝis sin je rememorado de du aĝuloj pri iamaj, bonaj tempoj de politika-socia agado. Paralele revenantis el neglekto kaj forgeso la religiaj valoroj.

Se estus aliel, Vantula ne edukus sian filon tiel ke tiu fariĝis episkopo kaj la plej alta superulo de la protestanta eklezio en Pollando.

Jan Zavada, milda, ege simpatia bonkorulo, estis permanenta revanto kaj la revoj ne malaperis el lia kapo ĝis la morto. Havante dek ok jarojn li lasis la lernejon, apenaŭ unu paŝon for de la matureca ekzameno, kaj translokiĝis al Parizo, kie li fakte nenion atingis.

Havante pli ol sepdek, li insiste petis min kunpreni lin por longa, monata ekskurso per kajakoj tra diversaj lagoj kaj riveroj. Kiel li, etstatura, gracila vireto povus elteni dum multaj tagoj kaj multaj horoj tage lacigan remadon? Sed pri tio li ne pensis.

En unu el la lastaj leteroj li skribis al mi interalie: (...) "mi povas al vi (sed nur al vi!) kaŝdiri mian eltrovaĵon, kiu - post **jaroj** da cerbumado (laŭvorte **jaroj**) montriĝis en mia cerbaĉo tiel simpla kiel $1 + 1 = 2$ (kompreneble, ĉiuj geniaĵoj estas tre simplaj, komencante de Newtona pomo). Bonvolu do provizore ne paroli pri tio en pli larĝa publiko (...) La eltrovaĵo konsistas en tiu simpla **17a Regulo de Esp. gramatiko**. Por esprimi ian ajn dialekton de la naciaj lingvoj en Esperanta traduko, oni devas simple movebligi la ĝisnunajn gramatikajn finaĵojn kaj vortfaradajn afiksojn, ekzemple:

anstataŭ:	mi laboras	skribi	mi as-labor
„	kokido	„	id-koko
„	duobla	„	obla-du

kaj tiel plu. Tiu projekto - ŝajnas al mi - **ne renversas** la ĝisnunajn regulojn, nur **vivigas** ilin, donante al Esperanto per tiuj ŝanĝoj nekalkuleble multajn esprimeblecojn, dank'al kiuj ĝi **fine** egalos al ĉiuj naciaj lingvoj aŭ eĉ superos ilin. Pripensu tion! (...) Do, vivu la "dialektigo de Esperanto". Sed - silenton! Eĉ ne unu vorteton ĝis mi, post plena elprovo, elpaŝos publike kun ĉi tiu herezo!"

Nun, post tri jardekoj, mi ne plu opinias devo prisilenti ĉi tion, ĉar estas trajto karakteriza por tiu homo.

Mi ege ŝatis lin. Okaze de liaj vizitoj ĉe mi, ni babilis ĝis tarda nokto, ne kapablaj fini. Aĝe li estis olda, sed spirite junuleca, kaj siajn planojn li etendis ĝis en la trian jarmilon. Li reprezentis generacion de esperantistoj, kiu jam preskaŭ formortis sed kiu estis fundamento de la Esperanto-movado en ties unua jarcento.

Virino eterne flamanta

Post kiam en la 1960-a jaro Stafeto* aperigis debutan volumon poezian **Nur tri kolorojn** de ĉefia poetino Eli Urbanova, ĝi tuj vekis atenton. La akcepto estis diversa, konforma al individuaj plaĉoj, sed ĉiu leganto sentis ke li tenas en la manoj produkton de vera poezia talento. Al ili apartenis ankaŭ mi mem. Traleginte ĝin pruntitan kaj ne povante aĉeti en Pollando, mi ekserĉis en Ĉeĥoslovakio, sed eĉ tie ĝi ne estis tiam akirebla, pri kio mi plendis en gearmika rondo. Absolute sen ia intenco. Tamen iu el ili menciis tion al la poetino, kaj ŝi sendis leteron al la eldonisto, petante lin sendi al mi ekzempleron. Ricevinte ĝin, mi skribis dankis al ŝi kaj volis pagi, sed responde velis letero: "Estimata sinjoro, ne koleru ke mi respondas nur nun - mi havis multajn zorgojn kun mia preparo por Londono (...). Mi ĝojas ke vi fine gajnis ĝin (la volumon), kaj vi nenion ŝuldas al mi."

Nu, kion fari? Mi dankis ankoraŭfoje kaj enmemorigis ĉion por futuro. Sed **Nur tri kolorojn** fariĝis komenco de nia amikeco. Kiam post kelkaj jaroj mi venis al Prago, Eli Urbanova estis inter la unuaj personoj, kiujn mi klopodis renkonti. Laŭ telefona interkonsento mi iris en la malnovan, luksan kafejon "Ĉe la Polva Turo". Malgraŭ ke ni antaŭe ne vidis nin, mi rimarkis ŝin tuj kaj, sidantan ĉe tableto, aliris kun vortoj: "eĉ de malantaŭe mi rekonas vin!". Ŝi turniĝis surprizite, ekridetis kaj... la babilo ekfluis tuj. Pli ol unu horon ni sidis tie, ne rimarkante ke la tempo fluas, nu, fine ŝi devis reveni al siaj propraj aferoj.

El tiuj diskutoj, el nia korespondado kaj precipe el ŝiaj versaĵoj formiĝis ŝia portreto. Ne nur la ekstera, ĉar tiun eblis rimarki tuj, sed la interna, psikologia, poetina, ege interesa. Laŭ aspekto Eli estis virino korpulenta, kio vereble** kaŭzis al ŝi ioman zorgon. En unu el la leteroj ŝi skribis: (...)"Nun vi do scias ke mi estas dika, ĉijare tamen mi estos pli libera kaj faros ion por mia aspekto. Simple venontfoje vi estos ravita - nepre!" Mi opinias ke tiu abundeta kamo tute ne difektas ŝian aspekton, sed persvadu virinon ke ŝi ne estu svelta!

***Stafeto** eldonejo sur la hispana insulo Tenerife

** **vereble** versimile, supozeble

Baldaŭ post la renkonto, preparante por preso **Nuancoj** - poezian volumon de Lina Gabrielli kaj mi, mi sendis al Urbanova peton ke ŝi verku antaŭparolon por tiu volumo. Longe daŭris silento, ĝis fine venis letero kun rifuzo. Kial ŝi rifuzis? Mi ne scias, ĉar la klarigon, ke ŝi ne havas tempon, mi neniam ekkredis, sed por la volumo tio ne estis bato, tre bonvenan antaŭparolon skribis Uiljam Old*.

La rifuzo ne damaĝis tamen nian amikecon, ĝi daŭris plu sen perturboj. Post kiam **Nuancoj** aperis ĉe Plejado, mi sendis al Eli ekzempleron kun varma dediĉo. Ĉe tiu okazo konfirmiĝis mia dekomenca impresio, ke la poetino estas tre malparolema. En diskutoj, post kiam la vere gravaj aferoj estis pritraktitaj, plua konversacio eklamis kaj la etoso similiĝis al tiu en preĝejo kiam la pastro tro daŭrigas la predikon. Post kiam mi sendis al ŝi mian poezivolumon, ŝi respondis: (...) "mi volis sendi telegramon, poste post tralego longegan leteron, kaj ankoraŭ pli malfrue almenaŭ karton..." Cetere, mian rimarkon jesas ŝi mem en rememora **Hetajro dancas**: "De ĉiam mi estis plie solulino (...) La konvencio lacigas min. Paroli pri nenio, kia sufero! Kaj ĉiuj ideoj estas for." Niaj kontaktoj aĝas jam pli ol tridek jarojn, sed mi havas eĉ ne unu ŝian longan leteron, cetere, supozeble ne nur mi. Antaŭ kelkaj tagoj venis poŝtkarto, kies neabunda teksto enhavas interalie sinceran konfesion: "Kara, pardonu, ke mi ne skribas, plurajn mi simile neglektas, kion fari, mi eĉ ne kredas, ke mi iam pliboniĝos, mankas al mi kaj tempo kaj energio (kaj mono), do pardonu"(...)

Nu, kaj mi pardonas jam tridek jarojn.

Dua trajto de Eli Urbanova estas io, kion mi nomas "eterna deziro ravi". Ĉiujn, sed precipe virojn. Esti amata, dezirata, adorata - jen kio saturas siajn versaĵojn, kaj narkotas iliajn legantojn. La eterna virineco sukcesas tie plene enkorpiĝi. La amo estas ne ekskluziva, tamen sendube ĉefa temo de ŝiaj versaĵoj, amo tute ne platoneska, kvankam ankaŭ ne primitiva, des malpli ia triviala. La poetino, subtília en la vivo, ne fariĝas kruda en siaj versaĵoj, fluas tie sango varma kaj pura.

Eli Urbanova formiĝis kiel poetino sub forta influo de Julio Bagi**,

*Uiljam Old (William Auld) eminenta skota esperantlingva poeto

** Julio Bagi (Gyula Baghy) eminenta hungara esperantlingva poeto

kun kiu ŝi multe korespondis kaj ricevadis konsilojn, sed en pli posta tempo ŝi deviis de tiu evolupado kaj ligiĝis kun la t.n. "praga skolo". Bagi konsilis esti singardema koncerne neologismojn kaj enkonduki ilin nur en kazo de neceso. "Sole la necesajn, sole la necesajn - li ripetadis, kaj mem, kiel verkisto, obeis tiun postulon. La anoj de la praga skolo manifestis radikale kontraŭan opinion. "Abunde kaj redunde*" - ili vokadis kaj en la beletron puŝadis multajn novajn vortojn. Baldaŭ eksplodis preskaŭ milito, pliparto de la esperantistoj ne nur forĵetis la novan principon, sed eĉ rekte kondamnis ĝin kaj sur la grupon ekŝprucis riproĉoj kaj insultoj. Necesas tamen noti ke kiel por, tiel ankaŭ kontraŭ esprimis sin same eminentaj esperantistoj.

De Eli Urbanova mi ricevis la broŝuron **Abunde kaj redunde** kvazaŭ manifeston de la skolo. Traleginte ĝin, mi sendis al ŝi dankan leteron, en kiu mi skribis interalie: "Atente kaj kelkfoje mi tralegis la kajeron, kaj trovas ĝin vere valora kaj moderna, kvankam tio ne signifas agnoskon de la rumleraj bizaĵoj" (...). Nun, post jaroj dum kiuj mi neunufoje konsideris la esencon de tiu manifesto, mi abolas la vortojn rilatantajn al Rumler kaj hontas pro ili. Senpripense, per rapida, tuja reago mi vundis la valoran intelektulon, pri kiu nune mi pensas: tiu homo scias, kion bezonas la Esperanta literaturo.

Kontraŭuloj de la praga skolo ne konscias, ke enkonduko de kelkaj neologismoj ne povas per si mem damaĝi lingvon. Ĉu en iu lingvo estos cent mil vortoj, aŭ ĉu cent unu mil, tio ne decidas. Lingvon povas ŝanĝi nur ŝanĝo de ĝia gramatika sistemo, sed ne enkonduko de iomo da neologismoj.

Sed kion mi iame diris, estas dirita. Donu la sorto ke Rumler ie tralegu ĉi tiujn vortojn.

Urbanova tute ne klopodis tiam persvadi min kaj aliri al la "pragskolaj" principoj, nek pledi por Rumler, ŝi nur sendis iom pli poste sian kontribuon por varsovia scienca interlingvistika simpozio **Lingva evoluo kaj beletra praktiko**. Mi komprenis tion delikata aludo, siaspeca demarŝo, sed ne entreprenis ian polemikon. Nun mi scias, ke prave.

Jozef Rumler, Juĵi Karen, Eli Urbanova, jen la kerno de la praga -

* **redunde** superflue

skolo. Ili havis, kaj certe plu havas, bonajn intencojn, sed por siaj evoluigaj streboj ili devis multe pagi. Venenaj atakoj venadis ne nur el ekstere, ankaŭ la ĉefia esperantista medio ne ŝparis akuzojn. Rezulto fariĝis bedaŭrinda - la skolaroj, deprimitaj bremsis la agadon, retiriĝis en siajn hejmojn kaj abolis, almenaŭ formale, la grupon. Pereis ankaŭ la far ili fondita Literatura Sekcio de Ĉefia Esperanto-Asocio. Por mi, kvankam ne ĉiujn mi konas persone, ili ne ĉesis esti estimindaj amikoj.

Lastatempe Urbanova laboris je sia nova verko, ĉifoje proza, **Hetajro dancas**. Ŝi sendis al mi specimenan eltiraĵon laŭ kiu eblas dedukti, kia estos la tuto: aŭtobiografia, rememora, tie-ie parenca al la **Litomiŝla tombejo**, alie saturita per romantika gemuto aŭ amkonfeso al Esperanto. Iomete mi timas, ke la libro trovos tre diversan akcepton, ekde kontenta aprobo ĝis riproĉa objekto, sed, aliflanke mi estas konvinkita ke ĝin, kun la **Litomiŝla tombejo**, la literaturhistorio estonte deklaras mejloŝtonoj sur la evolua vojo de la Esperanta beleto.

Sed **Hetajro dancas**, cetere kun titolo transprenita el **Nur tri kolorojn**, ne estos ŝia lasta verkaĵo. En la 1991-a ŝi skribis: "Nun post forsendo de la romano al Brazilo, kie ĝi estas eldonota, mi estas tamen iomete pli libera. Sed nur iomete! Ĉar mi emus poemadi ankoraŭ". Kaj en la sekvinta jaro ŝi skribis: (...) "krom tio mi laboras je mia lasta kolekto **Vino, viroj, kaj kanto...**" Diable, pene estus elpensi titolon pli adekvatan al ŝia personeco!

Nun mi senpacience atendas ambaŭ verkojn. **Nur tri kolorojn** apartenas al miaj ŝatataj poezivolumoj, eble al ili aldoniĝos **Hetajro... kaj Vino...**

Ne ekzistas dubo, ke kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn Eli Urbanova estas plena de verkemo. Eble miaj rememoroj pri kontaktoj kun ŝi, verkataj sen ia plano, venonte riĉiĝos je novaj elementoj, novan nuancoj, kaj ke ni reciproke instigos nin je plua kontribuado por la Esperanta poezio, kaj povos ĝoji pro ĉiu nova verko.

Serĉanto de la blua tono

Dum la tria "Esperanta kultura festivalo" en Opava mi interkonatiĝis kun Jiĵi Karen; lia kontribuo al la diskuto, enhave riĉa kaj oratore elstara, altiris mian atenton kaj mi iniciatis senperan interparolon. Ekde tiam daŭras nia amikeco.

Lia vera nomo estas Ladislav Podmele, sed sub pseŭdonimo Jiĵi Karen li eldonis dek ok poezivolumojn, kelkajn prozaĵojn kaj multajn artikolojn, sekve la plumnomo fariĝis almenaŭ same konata, kaj en la esperantista medio nur nemultaj personoj konas la veran nomon.

Por tiu homo la sorto ne ŝparis batojn, sed - aliflanke - ĝi hardis lin ĝis ekstremo kaj faris vere admirinda. Mi ne skribas sciencan biografion, nur simple notas rememorojn pri niaj renkontoj, interparoloj, longaj diskutoj, intimaj amikaj babiloj kaj longtempa korespondado. Se tie-ie troveblas detaloj, des pli bone, se ne, ankaŭ tiam la teksto enhavas iomon da sciaĵoj pri tiu neordinara homo.

Naskiĝinta en Litomiŝl en la jaro 1920-a, orfiĝinta jam en la infana aĝo, li ne tuj povis studi, do al la matureca ekzameno li subiĝis nur post la dua mondmilito kaj tiam ankaŭ ekstudis en la Karola Universitato en Prago filozofion kaj historion. Sed jam kiel deksejara knabo, en 1936, li kontaktiĝis kun Esperanto, preskaŭ samtempe ankaŭ kun Okcidental, kaj fariĝis arda zeloto de la dua. Pro hazardo: jen en lia urbo esperantistoj estis personoj socie negravaj, fanatikaj, dum okcidentalistoj apartenis al la "socia kremo". Profesoro Vanorny - tradukinto de **Illiado** kaj **Odiseado**, Vojenilek - perfekte konanta kvin lingvojn, Kjeŝina - eksa idisto, eminenta tradukanto en okcidentalon, nu, tiaj homoj povis impresi junan knabon, des pli ke ili interesiĝis pri liaj unuaj poetaĵoj, je kiuj esperantistoj restis surdaj.

Sed la historio interrompis tiun agadon: Hitler okupis Ĉeĥoslovakion kaj baldaŭ komencis la duan mondmiliton. Ĉiujn internaciajn lingvojn oni malpermesis, Karen estis devige sendita en Germanion labori, kvin jarojn li devis forstreki el sia interlingviva vivo. Tamen ankaŭ la tempo post la milito montriĝis malfavora. Karen volis agi, post longa paŭzo akumuliĝis en li energio, sed la ideo pri internacia lingvo jukis la novajn regantojn.

Pri la problemo ekinteresiĝis la komunista partio, ties sekreta polico, kaj - kvazaŭ la baroj estus ankoraŭ nesufiĉaj - aperis la Stalinaj **Tezoj koncerne la lingvistikon**. Nu, kun ili la artefaritaj lingvoj vere ne harmoniis.

Por Karen komenciĝis geheno. Kiomfoje oni vokis lin al la ministerio por internaj aferoj, al la sekreta polico, provis subaĉeti per eĉ granda "honorario por tradukaj servoj al la milico" (kiun li rifuzis), per tentoj kaj minacoj! "Vi kontraŭstaras interesojn de la laborista movado, kiu agnoskas lingvo internacia la rusan lingvon, vi malhelpas ĝian venkon, vi estas reakciulo". Kaj simile.

Bedaŭrinde, troviĝis personoj, kiuj "moliĝis", cedis, Karen ne. Ununura koncedo estis ke li aniĝis al la komunista partio. Tute formale kaj sub pezo de timo pri la familio, tiutempe li jam havis edzinon kaj du filinojn. Sed eĉ la koncedo montriĝis nedaŭra. Post kiam Ĉeĥoslovakion invadis la armeoj de la Varsovia Pakto, Karen ek troviĝis inter la protestantoj. Sekvoj venis baldaŭ: oni eksigis lin el la partio. Ankaŭ el la profesia okupo oni emis forigi lin, sed li ĵus travivis du infarktojn. Ĉi tio lin savis, kvankam ne tute. Oni indulĝe permesis ke li "propravole" fariĝu emerito, kaj li "propravole" konsentis.

Ĉi fakto havis ankaŭ pozitivan flankon: vivante nun sen profesiaj devoj, li havis pli multe da libera tempo kaj povis dediĉi ĝin al verkado. Dum dek ok jaroj 1972-1990 aperis dek tri poeziaj volumoj. Tiutempe li ne aktivis sur la Esperanta kampo. Modesta sed stabila emeritaĵo, sukcesoj poetaj, libero de pedagogiaj taskoj - ĉio ĉi iom serenigis la vivon, alportante tiam-iam ankaŭ momentojn de ĝojo.

Restante longan tempon en hospitalo, li - kiel infarktulo - povis nenion fari krom kuŝi. Post komencaj dekelkaj krizaj tagoj li povis almenaŭ enŝalti la etan radioricevilon, kaj jen foje li kaptis ĉarman fortepianan muzikon. Li avida aŭskultis kaj post finiĝo eksciis ke ludis partoprenantoj de la Ŝopenkonkurso ĵus okazanta en Pollando. Ĉiun sekvan tagon je difinita horo li senpacience serĉis la konvenan ondon, por kun ĝuo aŭskulti la ravan muzikon.

Post kelkaj jaroj tiuj hospitalaj aŭskultoj donis belan frukton: poezian volumon pri Ŝopen kaj lia muziko **Hledání modrého tónu (Serĉado de la blua tono)**. Nature, la volumon ne preteratentis la pola porkultura ataŝeo en Prago, kaj Karen estis invitita al Varso-

vio kiel gasto okaze de "Aŭtunaj tagoj de l' poezio". Oficiala invito Pollandon denove kaŭzis misfidon de la polico kaj "naskiĝis" multaj problemoj, precipe pasportaj, sed fine li sukcesis forveturi. Tie li renkontiĝis kun la eminenta ŝopenologo profesoro Slizinski, vizitis redakcion de la esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio, ĉeokaze en polaj literaturaj revuoj aperis liaj versaĵoj tradukitaj de Jozef Vačkov, nu, lia poeta animo trovis tie multan ĝojon. Sed post reveno oni denove gvatis lin malfide kaj ĉiu lia mencio pri la pola opozicio kaŭzis suspekton pri sekreta kunlaboro kun la "ĉartistoj**".

Kiel resaniĝanto post infarktoj Karen de tempo al tempo veturis al sanatorioj. Foje, en 1978, promenante tra la balneja** urbeto Podjebradi, li rimarkis sur muro vitrinon de la loka esperantista klubo. Li vizitis ĝin kaj tranigardis kelkajn librojn tradukitajn Esperanten. Je lia opinio, ke ne ekzistas bezono legi tradukaĵojn en Esperanto ĉar eblas legi ilin en la ĉeĥa, iu klubano promesis prunti al li originalan poezion; kaj fakte pruntis.

Nelonge poste, "konata verkisto kaj tradukisto de Esperanto Jiří Kojínek ricevis de mi miajn eldonitajn verkojn poeziajn (...). Iutage mi ricevis de li pakaĵon kaj jen preskaŭ 300 miaj poemoj estis tradukitaj Esperanten (...) Tiel mi lernis Esperanton surbaze de miaj tekstoj." Fakte estis ne lerno sed re-lerno post longa paŭzo. Baldaŭ Karen interkonatiĝis kun aliaj ĉeĥaj esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj: Eli Urbanova, Jozef Vondroušek, Eva Semanova, Jaroslav Majík, Edvard Tvarožek el Slovakio, kaj aliaj malpli konataj.

Karen ĉiam estis homo energia kaj agema. Baldaŭ li partoprenis la universalan kongreson en Lucerno, serĉis verkistojn tie kaj al Baldur Ragnarson sugestis fondi verkistan asocion.

Ĉi tiu ideo realiĝis en la kongreso en Budapeŝto. Sed elproksima rigardo en la verkistan medion rivelis al Karen ties latentajn rastaĵojn. "konkurenco estas inter verkistoj (...) - li skribis. Tiuj jam konataj, kies libroj aperadas, timas konkurencon de nove venintaj. Kaj tion mi baldaŭ spertis mem."

* **Ĉarto 79** manifesto de la ĉeĥa opozicio kiu finfine venkis kaj kies korigo, Vaclav Havel, fariĝis la unua prezidento de la nekomunisma ĈSSR.

** **balnejo** sanatoria entrepreno kun kuracaj akvo-basenoj.

La aludo koncernas lian artikolon en "Heroldo" **Ĉu EVA morte naskita ido?**, kie li prognozis ke tiu organizaĵo restos sur papero se oni ne realigos kelkajn kondiĉojn. Kiam li proponis ke krom kunvenoj de verkistoj EVA-anoj okazadu ankaŭ kunvenoj de ceteraj verkistoj partoprenantaj la kongreson, oni riproĉis lin kaj mokis. Ne mirinde do ke fine li venis al trista konkludo ke "ankaŭ inter esperantistoj ne povas regi harmonio (...). El la nordo, el la sudo, de okcidento kaj de oriento, ili estas vere diferencaj karaktere, temperamente, koncepte kaj ideologie. Batalo estas principo de la vivo, kaj paco harmonia restas nur idealo."

Kiam mi interkonatiĝis kun Jiĵi Karen, li estis en ĉi-supra spirita stato. Iom da seniluziigo, iom da amaro, da necerteco - jen kio katenetis lian energion. Sed lia senmorta optimismo venkis. Li proponis kaj fondis literaturan sekcion de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, al kiu baldaŭ apartenis li mem, Kojĵinek, Vondroušek, Semanova, Urbanova, Maĵik, Cink, Barandovska, Ciĥova... Al la sekcio li favoris kaj allogis siajn amikojn, verkistojn ĉeĥlingvajn: Rumler, Lazecki, Baar, Kojĵik, Dub...

Ĉar la sekcio organizadis artajn programojn ankaŭ por neesperantistoj, ĝi fariĝis konata ekster ĈEA kaj ĝia renomo kreskis. Ekde 1980 oni (sub ŝildo de "Paco") eldonadis literaturajn kajerojn: **Niaj aŭtoroj sin prezentas, Sur la du frontoj, La poeto ne mortas, Ĉeĥa literaturo en Esperanto, En koro de Eŭropo, Kvarfolio, Abunde kaj redunde, Karel Ĉapek, Jiĵi Kojĵinek, 52 ĉeĥaj poetoj en traduko Esperanten, Debato pri la praga skolo.** La lasta aperis en 1989.

Tiel streĉan laboron la netute sana koro ne sukcesis elteni. Kiam mi invitis lin al modesta seminario "Fokusoj de la kulturo en Beskido", responde venis letero minora kaj tristiga: "Mi travivis tre danĝeran kvaran infarkton, ses semajnojn mi restadis en hospitalo kaj nun mi absolute ne povas ien veturi."

Nu, - ekvibris penso en mia kapo - jen estas fino, ĉar post kvar infarktoj li ne plu kapablos aktivi. Reviviĝis en mia memoro la kune pasigitaj momentoj, diskutoj, identaj aŭ diferencaj opinioj, niaj longaj promenoj tra urbaj ĝardenoj en Opava kie neniu povis subaŭskulti nin... Ĉu mi ankoraŭfoje povos renkontiĝi? Kompatinda Jiĵi! Tiel vigla kaj agema homo!

Mi sendis edifan leteron, klopoĉis veki en li esperon, kaj kredigi

kion mi mem forte kredas - ke ni certe ankoraŭfoje renkontiĝos: "Mi ankaŭ travivis infarkton, ni kredu - dum ni ankoraŭ spiras - ke ne ĉio jam finiĝis."

Kaj imagu mian surprizon kiam post kelkaj monatoj mi legis en "Eventoj" sciigon ke en Jilina okazos pedagogia seminario de ILEI kaj prelegos interalie... Jiji Karen. Kvarcent kilometrojn for de Prago! Jen kia vitalo saturas tiun homon.

Kaj ĝi estis por li vere bezona. Jen malsaniĝis lia edzino kaj savi ŝin povis nur operacio de la koro. El kie preni monon por tiom multekosta afero? Karen, mem ne sana, faris ĉion eblan, duobligis siajn modestajn fortojn, kaj sukcesis akiri rimedojn. Li mem veturis kun ŝi al pariza hospitalo kie oni operaciis ŝin. Sed tio ne estis fino, ĉar pli poste montriĝis ke nepraj estas du aliaj operacioj, unu tre danĝera kaj suspektinda. Ankaŭ tion li venkis, sed post ĉi tiaj travivaĵoj, post longaj korpaj suferoj kaj psika streĉo la edzino kolapsis: ŝi falis en deprimon profundan. Denove hospitalo, poste longa prizorgado postulanta maksimuman mildon kaj permanentan ĉeeston. Kio estos poste?

Sed jam post ĉi-supraj eventoj li sendis al mi longan tajpaĵon **El la vivo de unu ĉeĥa interlingvisto**. Mirinda tajpaĵo, enhavanta ne nur la tutan historion de lia aktivado sur la interlingvistika kampo, sed ankaŭ liajn ideojn, opiniojn, dezirojn kaj avertojn. En akompana letero li skribis:

"Kara amiko, mi verkis kion mi promesis verki. Eble vi ne povos publikigi tion pro longo kaj pro kritika voĉo. Sed tio estas rezulto de miaj spertoj (...) Tiun ĉi materialon mi donas en viajn manojn kiel mian interlingvistan testamenton. Dependas de vi, kion vi faros kun ĝi. Tamen ne ĵetu ĝin enkorben, estas tio mia tuta vivo."

Kara Jiji! Estiminda amiko mia! Mi ankoraŭ ne scias, kion mi faros kun via manuskripto. Plej arda deziro estas publikigi ĝin tutan, sed vi ja konas nuntempajn obstaklojn. "Pritranĉi" ĝin signifus kripligi, kaj lezi ĝian valoron, do mi preferas atendi; tio ĉi ebligos ankaŭ pli detalan, profundan pripenson. Sed estu certa, ke mi ne prodigos ĝin, nek permesos prodigi. Ĉi tion postulas estimo por verkista testamento de mia amiko. Eble venos tempo kiam povos ĝin tralegi vastaj rondoj de esperantistoj. Ankaŭ tiuj, kiuj sur vin kraĉis.

Onjo Anna

La amikiĝon kun tiu eksterordinara virino mi dankas al reflekso de simpla helpemo. En la 1960-a jaro dum pola landa kongreso de Esperanto en Vroclav, tuj antaŭ la komenco, mi rimarkis viron kaj du virinojn starantajn iom flanke, videble embarasitajn kaj diskutantajn nerveze. Observante ilin kelkan tempon mi eksupozis, ke aŭ iliaj kongresaj dokumentoj ne estas en ordo, aŭ io alia paneis, ilia konduto estis videble alia ol de la ceteraj partoprenantoj atendantaj ĝoje la inaŭrugon.

Post momenta hezito mi decidis aliri kaj alparoli ilin. Baldaŭ montriĝis ke mi ne nur ne eraris, sed ke la afero estas multe pli komplika ol supozite. Tiam en Pollando validis absurdaj komunismaj ordonoj pro kiuj preskaŭ ne eblis ricevi pasporton. La menciita grupeto estis ĉefoj kaj ili transpaŝis la limon surbaze de limpermesiloj. Sed laŭ tiaj permesiloj liciis restadi nur en la ĉelima zono, t.e. 15 kilometrojn ambaŭflanke; iri pli profunden en la landon ne liciis. Kaj tiuj ĉefoj, ignorante la ordonojn, veturis al Vroclav, t.e. 300 kilometrojn for de la transpaŝita limo! Esperantistoj havas fantazion!

Nu, sed kion fari nun? En hotelon ili ne povis iri, ĉar necesus tie montri la dokumentojn kaj tuj evidentiĝus la delikto. La organiza komitato ne antaŭvidis similajn kazojn, do ne emis zorgi pri homoj ne obeantaj la ŝtatajn leĝojn. Mi supozis ke la kompatindaj ĉefoj antaŭe tute ne zorgis, kie ili tranoktos en Vroclav, esperante "iel ni ja solvos la problemon". Kaj la problemo montriĝis ne nur pene solvebla, sed ankaŭ danĝera, kion bone scias homoj loĝintaj tiame en socialismaj landoj. Ne rare pro tiaj "krimoj" homoj ektroviĝis en karceroj. Ne maloftaj estis kazoj, ke tuta grupo da homoj, ne sciante pri tiu stulta ordono, veninte en la ĉeliman zonon, ekzemple por nupta festo, ektroviĝis en arestejo - en solenaj vestaĵoj kaj kun nuptaj donacoj!

Konante la situacion, mi decidis ke ne decas lasi la ĉefojn surstrate. Rapide, kvankam atente kaj diskrete, ni ekserĉis lokon en kiu ili povus loĝi tri tagojn sen montri siajn dokumentojn kaj esti notitaj en iu registrolibro. Konsentis akcepti ilin private iu judino, memkomprene kontraŭ konvena pago. Feliĉe, oni ne kontrolis ilin

en la urbo mem. Mi amikiĝis tiam kun ĉiuj tri personoj, sed precipe kun Anna Milatova, simpla, ekstreme bonkora kaj noblanima virino, kaj nia varma amikeco floris pli ol tridek jarojn. Por mia filo ŝi fariĝis "onjo".

Milatova naskiĝis en la ĉeĥa urbeto Tjinec apud la pola limo, kaj travivis tie la tutan vivon, komence en kvarpersona familio, pli poste sola. Post amaraj travivaĵoj la ĉefan sencon por sia vivo ŝi trovis en Esperanto kaj al ĝi oferis plejparton de la fortoj kaj libera tempo. Cetere, ne nur private. Estante oficistino en la granda Tjinec-fandejo, ŝi ofte sciis profiti ties presejon, ne sole por akcidencaj afiŝoj aŭ flugfolioj, sed eĉ por presado de revueto.

Esperanton ŝi renkontis ĉirkaŭ la jaro 1920-a. Sur muro de Laborista Domo ŝi tiam rimarkis afiŝon anoncanta prelegon pri la internacia lingvo kaj komencon de kurso; prelegis konata laborista aganto Slivka, la kurson estis gvidonta lia amiko Liberda. La afero ekinteresis la junan, tiam dekokjaran knabinon, ŝi venis, aliĝis, kaj... restis por ĉiam en la verda mondo.

En Tjinec, ĉe la Hus-strato 304, ŝiaj gepatroj havis en ĝardeneto malgrandan, vilaosimilan domon, kie la familio vivis trankvile. Sed la gepatroj mortis, la fraton, juriston, murdis hitleranoj en prizono, Anna restis sola. Tiam ŝia domo fariĝis gemuta hejmo ankaŭ por Esperanto kaj esperantistoj en- kaj eksterlandaj. Ŝi kontaktiĝis kun ili dum plej diversaj kunvenoj, feriadoj, renkontoj, seminarioj, kaj - memkomprene - kongresoj. Ŝi partoprenis preskaŭ ĉiujn universalajn kongresojn ekde la varsovia en 1959, ĝis la viena en 1992. Poste ŝi ne plu kuraĝis pro aĝo kaj sanstato. Okdek du jaroj kaj glaŭkomo de la maldekstra okulo fariĝis decidaj baroj por vojaĝoj je pli granda distanco. Sed lokan aktivadon ŝi ne lasis.

En sia vivo ŝi interkonatiĝis kun multaj elstaraj personoj de la Esperanto-movado: Lapenna, Seppik, Sekelj, Varingjen, Signarski, Ŝtajner... Unu el la tradukintoj de **Elektitaj versaĵoj de Lermontov**, Konstantin Gusev el Moskvo, skribis en la al ŝi donacatan ekzempleron varman dediĉon:

Akceptu, amikino Anna,
Modestan tiun ĉi donacon
Kun kora vort' samideana
Al vi bondeziranta pacon,

Sur via verda voj' prosperon,
Feliĉon de la bona sano
Kaj renkontiĝi la esperon
Kun la aŭtor' samkongresano...

Ŝi vizitis Eŭropon de Istanbul ĝis Helsinki, de Madrid ĝis Moskva, dum siaj vojaĝoj loĝis prefere en privataj domoj, tiel ekkonante la tieajn homojn (kiujn ŝi gastigis ankaŭ ĉe si en Tĵinec), faris multajn fotogramojn kaj diapozitivojn, kaj ĉion poste uzis por kunvenoj, prelegoj, rakontoj en kluboj, lernejoj kaj kulturdomoj.

Neforgesebla estas ŝia helpo al ĉeĥino Kristinova. Jen dum aŭtobusa ekskurso tra Pollando tiu subite malsaniĝis je gala veziko kaj devis esti tuj operaciata en Gdansk. Anna Milatova estis la ĉefa helpantino en la tuta afero. Pere de esperantistoj enhospitaligis ŝin, zorgis pri ŝi en hospitalo, kaj post du semajnoj kun helpo de la ĉefdelegito en Pollando Toĉiski aranĝis stafetan transporton hejmen. En Gdansk oni entrainigis ŝin, en Katowice transvagonigis, kaj en Cieŝin jam atendis ŝin esperantistoj, kies tasko estis transdoni ŝin al ŝiaj parencoj. Esperanto plenumis tiam gravan servon.

Milatova estis virino absolute altruisma, ĉiu malico, egoismo, profitemo estis por ŝi fremda. En mian memoron por ĉiam engravuriĝis ŝia konfeso:

- Vidu, la sorto donis ke mi multe vojaĝis, multe spertis, multan scion akiris, multon vidis. Mi ne volas kunpreni tion en la tombon, sed antaŭ la morto ĉion disdoni al homoj.

Teatra motivo

Mi studis filologion en la krakova universitato dum la jaroj 1948-52. Veninte tien, mi ekloĝis kune kun mia pli aĝa frato, ankaŭ studanta tie sed juron. Foje li kunprenis min en negrandan, modestan sed ŝatatan Rapsodian Teatron je **Jevgenij Onegin** de Aleksandr Puŝkin. Neforgesebla spektaklo! Pinta verko de la genia rusa poeto brilis per ĉiuj siaj ĉarmoj kaj plene ravis la publikon. La teatro mem, konforme al sia nomo, surscenigadis ĉefe grandajn verkojn poeziajn, eposojn, kaj uzadis nur tre malmultajn ekipajajn objektojn, rolantajn nur kiel simboloj, ekzemple senapogila benko estis siedo sur kiu la herooj veturis tra grandegaj neĝoplenaj vastoj de Ruslando. La ĉefa funkcio apartenis al la voĉo, kiu devis elsorĉi en imago de la spektantaro ĉion imagendan.

El la geaktoroj precipe unu altiris mian atenton kaj tute min konkeris, nome Tatiana, kiun rolis Danuta Miŝalovska (Michalowska). Delikata, reverna brunulino, kio cetere konformis al la heroino en la poemo, sukcesis tiel ĉarme, subtile ludi sian rolon, ke mi rigardis kaj aŭskultis fascinite. Malgraŭ ke post tiu tempo pasis kvardek jaroj, mi ĝis nun vidas kiel

(...) *Tatiana*

*Starante kun sopir' sen pov'
Sur vitron spiris per la blov'
Kaj sur nebulo diafana
Desegnis ŝi per fingr' en ve'
Literojn karajn O kaj E. **

Pola proverbo diras: "Kio malaperis de antaŭ la okuloj, tio malaperas ankaŭ el la koro." Duonvero. La junan aktorinon mi daŭre ne povis forgesi kaj arde mi serĉis afiŝojn pri denovaj spektakloj de la Rapsodia Teatro. Sed por ĝi venis mornaj tagoj. La reĝimo, detruanta ĉion nekomunisman, detruis ankaŭ tiun valoran teatron, kaj mi tiame ne sukcesis revidi mian Beatriĉe.

* trad. N.V. Nekrasov

Tamen, post jaroj, mi foje partoprenis la polan landan kongreson de Esperanto en Vroclav. En la dua tago okazis poezia recitalo kaj jen subite mi ekvidis sur la podio mian adoritino.

Iom pli aĝa sed same, trankvile bela, ŝi recitis senerare la abundan programon, ĉifoje poezian-prozan. Tute en Esperanto. Estis por mi granda surprizo ĉar mi absolute ne sciis, ke ŝi estas dulingva aktorino. Posttagmeze mi emis iel albalbuti ŝin, sed sen sukceso ĉar daŭre ĉirkaŭis ŝin admirantoj, precipe tiuj el Krakovo. Supozeble ŝi estis lernintino de profesoro Signarski.

Denove pasis longa tempo, mian kapon kronis jam kvindeko da jaroj kaj multaj arĝentaj haroj. Fojan tagon mi rimarkis anoncon ke en miaurba tatro, en ties stila vestiblo, okazos poezia vespero kun recitalo far Danuta Miĥalovska. Nepene estas diveni ke mi tuj decidiĝis.

Sed ĉifoje mi ekvidis jam seriozan damon, vicrektorinon de la krakova teatra altlernejo, elegante dignoplenan. Ŝi recitis rave. Longaj poemoj de la granda pola poeto romantisma Ciprian Norvid, kaj de Karol Wojtyła (Wojtyła) - nuna papo Johano la Dua, sonis el ŝia buŝo perfekte, sen eĉ plej eta manko, rekte grandioze.

La aŭskultantaro estis negranda sed aplaŭdis freneze, certe kun plej sincera entuziasmo. Mi revenis hejmen forte influita per ŝia matura arto, kiel iame per la june rava. Kaj longe - estante jam esperantisto okupiĝanta pri verkado - mi konsideris, kial la pola esperantista medio neniam ekpensis ligi ŝin pli forte al la movada teatro, elprofiti ŝian brilan talenton, perfektan recitkapablon. Tiom ofte oni allasas sur scenejojn diversajn amatorojn sen kvalifikoj, programojn ne sufiĉe preparitajn, ne kontrolitajn, kaj ne sufiĉe klopodas montri vere altvaloran spektaklon.

Miĥalovska reprezentis plej altan nivelon de la recita arto kaj mi daŭre restas ŝia admiranto. Nur iometan rankoron mi sentas al ŝi: kial ŝi ne edukas sian esperantlingvan posteulinon?

"Scienca Revuo"

Legante tiun revuon, mi foje rimarkis plendon de la tiama redaktoro profesoro Boĵa Popovic, ke en la redakcia provizo presotaj artikoloj tute ne abundas. Mi sendis tien eseon **Evoluo de la titola paĝo** kaj ĝi aperis tre frue, ĉar jam en la februara kajero. Laŭ la kontaktoj mi rimarkis, ke profesoro Popovic apartenas al la redaktoroj kun kiuj verkantoj volonte kunlaboras. Li ne kapricis, komprenis obstaklojn sur la verkistaj vojoj, ne tre postulemis kaj, ĉefe, preskaŭ tute ne intervenis en la aperigotajn manuskriptojn. En mia dekpaĝa teksto li faris nur unu ŝanĝeton, ankaŭ ne brevigon. Lia revuo ne egalas aspekte al mondaj sciencaj periodaĵoj, sed aperadis akcepteble regule, sen longaj tardoj.

Tamen, en tiu tempo naskiĝis kvereloj inter la redaktoro kaj UEA, oni flustris pri mono. Sekve de tiuj diskordoj Popovic demisiis kaj lian taskon transprenis doktoro Tiblevski el Pollando; tiu redaktorado finiĝis per tuta fiasko, el kiu tiris la revuon doktoro Josef Kavka el Prago. Ni interŝanĝis kelkajn leterojn, keĵ en 1982 li aperigis mian studaĵon **La prezoj de la libroj**. La revuon mem li klopodis levi forme sur pli altan nivelon, presigis ĝin normale en presejo, sed tio supozeble altigis la preskostojn ĉar la kajeroj magriĝis. Bedaŭrinde, ankaŭ la aperritmo fariĝis malpli regula. Dum redaktorado de Josef Kavka mi publikigis en la revuo ankoraŭ la eseon **Ekslibrisoj**.

Laŭvica redaktoro fariĝis doktoro Rudi Hauger el Svislando, scienca laboranto en la Federacia Teknika Altlernejo, homo energia, klare scianta kion alceli, strebanta rigore aranĝi la aferojn de la redaktata revuo. Li unue klopodis ĝisdatigi la financojn. Sed ĝuste la financoj montriĝis la plej malmola nukso. Hauger reklamis disvendon de la ĝisnunaj, malnovaj kajeroj de "Scienca Revuo", esperante ricevi tiel iom da mono. Por akiri sufiĉan materialon publikigotan, li proponis pagi la abonadon per verkado de artikoloj. Al la membroj de ISAE li apelaciis pagadi regule kaj kiel eble plej frue la kotizojn.

Bonaj ideoj, sed ĉu realigeblaj? Krome, li fiksas por la (virtualaj) aŭtoroj kondiĉojn, pri kiuj multaj balancos per la kapo:

"Prefere uzu laseran tajpilon... Se vi uzas ordinaran, nepre uzu novan rubandon... Uzu bonkvalitan paperon... La larĝo de linioj estu inter 14 kaj 16 cm... La alteco de la teksto estu sur ĉiu paĝo 23 cm... Se vi ne havas tempon, tajpigu ĝin en Grafika Centro de Flandra Esperanto-Ligo..." le mi eĉ legis postulon ke aŭtoroj de artikoloj devas esti membroj de ISAE por la koncerna jaro.

Bona Dio! Ĉi tiuj postuloj atestas, ke la redaktoro ne konas la situacion en multaj landoj. Loĝante en Svislando, li supozas ke en aliaj estas sama vivsituaĉio! Ĉu li ne aŭdis, kun kiaj malfacilaĵoj baraktas tie sciencistoj kaj verkistoj? Se iu havas ordinaran tajpilon, li estas tute kontenta. Bonkvalitan paperon? El kie preni ĝin? Bone, se entute aĉeteblas papero, pri ties kvalito neniu diskutas. Tajpigi en Grafika Centro? Ĉu tie oni tajpas senpage? Kaj se ne, tiam aŭtoro pagu por la tajpado, poste sendu la tajpaĵon al "Scienca Revuo" kaj poste... li ricevos nenion, ĉar SR ne pagas honorariojn! Krome, ĉu verkinto, kiu ne estas aktuale membro de ISAE, unue membriĝu kaj poste sendu sian artikolon al SR, ĉar sen membreco ĝi ne aperos! Jen novaj ideoj de nova redaktoro! Nu, al la redaktoro mi deziras ĉion bonan, sed la estontecon de SR mi vidas en nebulo.

Mi kunlaboris kun tiu revuo sed mi ĉesis, simple ĉar sub tiaj kondiĉoj mi ne plu povas, mi tamen ne hezitas konfesi ke estas mia deziro vidi ĝin en brila stato. Ununura, aŭ preskaŭ ununura, scienca revuo en Esperantio meritas pli helan vivon ol ĝi havis ĝis nun, kvankam kulpas pri tio grandparte la esperantistoj mem. Apartiĝemo diserigas la esperantistan intelektulan mondon, kaj la naskiĝantaj eroj ne kapablas vivteni proprajn revuojn. Iam mi pledis en "Heroldo" por ke ĉiuj restu en ISAE, kaj en ties kadro agu kiel fakaj sekcioj, sed mia pledo montriĝis voko sur dezerto; feblaj apartaj asociaĵoj ne emas cedi kaj vegetas plu. Kaj la estonteco restas enigmo.

SEU en Gjula

En januaro 1967 mi ricevis inviton prelegi en la Somera Esperanto-Universitato en Gjula. Konforme al peto de la organiza komitato mi sendis du proponojn:

1. La verda parnaso en Pollando. Literaturhistoria skizo pri la pola kontribuo al la monda esperantlingva literaturo.

2. La libro - la plej riĉa trezorejo de l' homaro. Bibliologia kaj bibliofilia studo pri la libro, ties historio, valoro kaj signifo.

Baldaŭ venis respondo ke oni elektis la duan temon, ĉar ĝi ŝajnis pli internacia. Tiamaniere komenciĝis miaj kontaktoj kun la Somera Esperanto-Universitato en tiu sudhungaria urbo. Mi estis tie ankoraŭ kelkfoje, sed ne ĉiam kun prelego.

La ideo mem dekomence ŝajnis al mi tre trafa. Gjula havas rare multnombrian basenaron kun saniga akvo diverstemperatura, diverse efikanta, kaj en la postmilita tempo, precipe dum la sepa dekada, la magistrato konstruigis tie grandan sanigan entreprenon kun multaj kuracistoj, flegistinoj, masaĝistoj, riĉa ekipaĵo por saniga gimnastiko k.s. Malsanuloj trovis tie helpon kontraŭ morboj, sanuloj ripozon post tutjara laborado. Tiun escepte favoran situacion scipovis eluzi kelkaj lokaj esperantistoj, lanĉante ideon de "somera universitato" - semajna ciklo de prelegoj, po du tage, pri diversaj temoj, kun diverslandaj prelegantoj.

Kaj fakte, Somera Esperanto-Universitato fariĝis ĉiujara aranĝaĵo donacanta al la partoprenantoj neforgeseblajn travivaĵojn kaj rememorojn. La prelegoj estis nutraĵo por intelekto, vesperoj proponis distron, kaj la balnejo funkciis dum tuta tago. Paradizo surtere! Se la vetero belas, memkomprene.

Kiam mi partoprenis unuafoje, ĉeestis ĉirkaŭ ducent kvindek personoj, multaj ege interesaj. Hejmen mi portis interkonatecon kun gesinjoroj Kibl (Keable) el Londono; li estis jam emerito kaj nemulte parolis pri sia profesio, ŝi estis ĵurnalistino en "Morning Star". Plue kun Imre Kadar, ĉefa persono en la organiza komitato de SEU. Fakte ni ekkontaktis jam antaŭe en Pollando sed en Gjula nia amikeco fortiĝis. Eleganta, ĝentila, plaĉa, bone reganta la lingvon (cetere ankaŭ la germanan), li brilis en societo per sia inteligenteco. Kun granda bedaŭro mi observis dum pli postaj jaroj

kiel tiun homon detruas alkoholo.

Plue kun doktoro Matefi, vaste instruita juĝisto, kiu tamen per propraj studoj perfekte ekregis la historion de Hungario kaj fariĝis respektata eksperto pri la historio de tiu lando eĉ inter fakuloj.

Ankaŭ kun doktoro Baĉkaj, altranga oficisto en la direkcio de la hungaraj fervojoj, tiutempe prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Ĝis nun staras inter miaj libroj **Ora duopo. Jubilea libro pri Bagi kaj Kaloĉaj**, ricevita de li donace kun varma dediĉo.

Nu, kaj ankoraŭ multaj aliaj. Bedaŭrinde, la postaj politikaj eventoj en la meza Eŭropo por multaj jaroj detruis tiun valoran aranĝaĵon. Cetere ne nur la politikaj, ankaŭ la ekonomiaj, kaj el tiu kolapso Esperantaj medioj ĝis nun ne sukcesas resaniĝi. Kiel diris mia amiko Jiji Karen, ni ĉesis esti sklavoj politikaj, sed fariĝis sklavoj ekonomiaj. Mi pensas tamen, ke ne mortis la ideo mem: renkontiĝoj kun varia programo scienca-kultura, kaj paralele ripoza-distra, donanta al la partoprenantoj okazon trejni sian lingvokonon. Se nur nia mezeŭropa regiono resaniĝos, la hungaraj esperantistoj certe klopodos revivigi tiun valoran ideon.

Virino riĉa je emocioj

Mi ne sukcesas riveli en la memoro cirkonstancojn, en kiuj komenciĝis mia interkonateco kaj - kio montriĝis baldaŭ - amikeco kun Lina Gabrielli. Sed tio certe okazis komence de la sesdekaj jaroj: el la mezo de 1963 devenas ŝia unua letero al mi. Iom antaŭe ŝi petis, ke mi esprimu opinion pri ŝia libro **La kombilo**. Mi fakte tralegis la libron, la dumlegajn noticojn mi ordigis je kohera kvazaŭ recenzo kaj sendis al Italio.

Baldaŭ venis entuziasma letero. "Kiam mi legis vian recenzon, larmoj malsekigis miajn okulojn. Mi pruvis saman, profundan emocion, kiel tiam dum mi parolis kun vi kaj mi sciis ke vi komprenas min (...). Koran dankon, kara amiko, pro via analizo, pro via kompreno."

Nu, mi supozetas, ke la recenzo kaŭzis tielan emocion iome pro la fakto, ke ĝi atingis ŝin kuŝantan en hospitalo post grava operacio. En tiaj cirkonstancoj oni estas aparte impresiĝema. Sed fakto estas fakto - tiam ekis renkontiĝadi niaj vojoj.

En tiu tempo Lina Gabrielli verkis fakte en du lingvoj, apud **La kombilo** kaj **Bill kaj Lazuraj Okuloj** elkreskis **Un cuore caldo**, apud **Karnavalo - Racconti della Giovane eta**. En unu el la leteroj ŝi skribis:

"Post vizito al Pollando kaj la kongreso en Sofio (...) mi komencis skribi alian verkon. Ĝi entenos serion da rakontoj sub la ĝenerala titolo **Aventuroj**. Se mi sukcesos verki ĝin, kiel mi ĝin sentas, la leganto - kompreneble tiu kiu estas sentema kaj nesupraĵa - pruvos grandajn emociojn. Se vi volas, vi povos esti unu el la unuaj legantoj." Sed tiu libro supozeble neniam naskiĝis, ja mi poste nek aŭdis ion pri ĝi, nek mi renkontis inter la aperintaĵoj.

Lina tiam gastadis ĉe mi, ni multe babilis pri libroj, ŝpinis verkistajn revojn, ofte ĝis tarda nokto, kaj ĝuste tiam naskiĝis projekto pri komuna poezia libro; sed ĝia realigo devis atendi ĝis la 1980-a jaro. Tiame kulminis ŝia multflanka agado. Ŝi verkis, gvidis kursojn, eldonadis sian dulingvan revuon "Voce del Centro Esperantista Piceno", fondis propran eldonejon "Plejado" kaj ligis al ĝi ambiciajn planojn. Se mi ne eraras, ŝi fondis ĝin por eviti senĉesan baraktadon kun Esperantaj eldonejoj, cetere baraktantaj ĉerande de financa abismo. Kaj fakte ŝajnas ke kelkajn el la tradukaĵoj far ŝi eldonitaj ne kuraĝus aperigi aliaj eldonistoj. Sed

komencante eldonadon ŝi ne konsciis, kian ŝarĝon ŝi metas sur sin. Fariĝi eldonisto estas facile, sed resti eldonisto, tion sukcesas nur nemultaj. Post miaj **Amaraj laŭroj** en "Heroldo" 1978/16 Albert Gudher skribis al ŝi leteron kun la vortoj, ke "li mem suferas ŝiajn suferojn." Karakterizaj vortoj, ĉar ankaŭ Gudher estas eldonisto, kvankam li - laŭ siaj propraj vortoj - eldonas verkojn nur de tiuj, kiuj mem pagas la preskostojn.

Lina riskadis. Ŝi balancis finance, leviĝis, sinkis, sed ne emis cedi. Fakte, kvankam nun ne eldonante, ŝi neniam likvidis la eldonejon, nur interrompis la aktivadon por pli-malpli longa tempo. Ŝia rilato al la eldonado estis ne nur komerca, sed ankaŭ emocia. Se estus aliel, ĉu ŝi kuraĝus eldoni **La ĥimeroj** de Nerval, **La libro de la amo** de Folero, **La dia avarulo** de Dobračinski, **La dudek kvar sonetoj** de Labe? Ja anticipe eblis supozi ke Esperantio ne garantias ilian komercan sukceson. Sed tiu riskado donis al la Esperanta literaturo kelkajn valorajn librojn.

Lina Gabrielli estas virino societema, ne ŝatas solecon, gravitas al homoj, sed kvazaŭ pro spito la sorto longe ne donis al ŝi vivkunulon; kaj kiam en ne plu juna aĝo ŝi edziniĝis al la pariza inĝeniero Trenner, la feliĉo daŭris mallonge. Li mortis post neplene du jaroj. Do denova soleco. Ne povante resti en la pariza loĝejo, ŝi revenis al Italio kaj ekloĝis en Kastel di Lama. Sed la eventoj malfavore efikis je ŝia vivo. Baraktado kontraŭ eldonaj, aŭ prefere vendaj problemoj, perdo de la edzo, neceso ekloĝi en eta loĝloko, perturboj en la sanstato - nu, por unu sola virino ja estas sufiĉe. Ŝajnas, ke ŝia aktivemo febliĝis, kaj mi time dubas ĉu ŝi reakiros la antaŭan elanon.

Nu, lastatempe ŝi denove translokiĝis al sia iama domicilo Askoli Piceno, iris tien kun ĝojo kaj sentas sin bone, en la lastatempa letero eĉ menciis intencon veni al "La ora pola aŭtuno" en Miedzigorze, kie ŝi iame travivis belajn omaĝojn al siaj literaturaĵoj, tamen la tempo fluas kaj ne senspure. Se reviviĝos ŝiaj fortoj, eble reviviĝos ankaŭ la "Plejado", en kiu kun la bonega presisto Angelo D' Angelo ŝi "intencis eldonadi verkojn, en poezio kaj prozo, de senduba literatura valoro (...) de poetoj kaj prozistoj de la tuta mondo, de ĉiu popolo, de ĉiu epoko, de ĉiu skolo, de ĉiu lingvo, precipe de esperantistoj."

Nobla, bela ideo sed ĉu realigebla? La kleraj, kulturaj medioj en

Esperantio ne estas sufiĉe grandaj por garantii ekziston de kulturaj kaj sciencaj revuoj kaj foraĉeton de la eldonitaj libroj. Granda parto de la esperantistaro ne regas la lingvon sufiĉe por kompreni la enhavon de altnivelaj kulturaj programoj, precipe de la poezio, kaj ĉi tio efikis deprime je verkistoj kaj artistoj, dolore konsciantaj ke ilia arto estas komprenata nur parte, supraĵe.

Nu, sed ankaŭ entuziasmo de eldonistoj havas sian valoron, certe tre gravan, tial mi ĉiam aprezis Lina Gabrielli. Ankaŭ pro ŝiaj kuraĝo kaj persisto. Dum niaj kontaktoj mi rimarkis en tiu virino tri dominantajn ecojn - vojaĝemon, honeston kaj emociemon. Se nur ekdisponus sin okazo, ŝi pakis valizojn kaj... adiaŭ hejmo. Ne nur por tagoj sed eĉ por semajnoj. Ĝuste pro tiu vojaĝado ŝi sukcesis ekkoni multajn landojn, urbojn, familiojn ĉe kiuj ŝi kutime loĝis, individuajn homojn, kaj travivi emociigajn renkontojn, kiel tiu priskribita ĉekomence en **La ĝardeno de la urbestro**.

Tiu libro, cetere, estas evidenta ekzemplo de ŝia emociemo. Jam en **Vivendo** pruvis ĝin kelkaj versaĵoj, kaj en **La ĝardeno** ĝi vibras en preskaŭ ĉiu rakonto. Sed ne nur en la verkoj, en la vivo de Lina ankaŭ. Kiom ofte mi rimarkis ke okazaĵoj ordinaraj, simplaj, ekscitas aŭ eĉ ardigas tiun virinon dezirantan ke la tuta mondo estu unu granda paradizo. Tiusence ŝi estas vere pura disĉiplo de la Majstro Ludoviko.

Kiel arde ŝi defendis Vilhelmon Oeste, kiam ruliĝis sur lin lavango da riproĉoj post apero de la far li tradukitaj **Dudek kvar sonetoj** de Luiza Labe. Eĉ mi iomete arogantis kaj nun mi hontas. La traduko vere estas malfacila por lego, sed ĉu licis tiel riproĉi tradukiston pro tio ke li strebis redoni plej fidele la formon de la versaĵoj? Troa rapido laŭdegi aŭ kondamni literaturaĵon, entute artaĵon, ofte montriĝas evidenta eraro, ĉar la tempo tre ŝatas modifi la iamajn unuajn verdiktojn. En Esperantio same, kiel ekster ĝi.

Post kiam Lina Gabrielli edziniĝis, ŝi grandan parton de sia tempo devis doni al la hejmo. Ekdormetis "La Plejado" kaj "Voce del Centro Esperantista Piceno", niaj kontaktoj loziĝis, leteroj cirkulis ne tiom ofte, tamen daŭre, kaj ni korespondas ĝis nun, sporade. Kaj tute certe mi konservos por daŭre en la memoro mian kunulinon en **Nuancoj** kaj ŝatatan honestan amikinson.

Tespisidino

Septembre 1980 en Ĉeĥoslovakio mi spektis la unupersonan teatraĵon de Valdemar Vinaĵ **Ĉerande de abismo**. Rolis en ĝi Eva Semanova, aktorino el Praha. Ŝi tiel impresis min per sia ludo, ke mi deziris ekkoni ŝin persone kaj petis la aŭtoron, jam al mi konatan, iel aranĝi tion. La afero ne estis malfacila. Kun Eva li vivis en plena konfido, reĝisoris kelkajn ŝiajn spektaklojn, do en konvena momento li prezentis min kaj ni sidiĝis ĉe tableto de apuda kafejeto. Jam antaŭe mi rimarkis, ke ŝi havas iome ruĝkan voĉon, kaj dum la interbabilado mi asociaciis tion kun fumado. Ĉe la tablo ŝi senĉese fumis. Vinaĵ, rimarkante ke ŝi ekbruligas cigaredon je la stumpo de la antaŭa, ankoraŭ glimanta, diris mildvoĉe:

- Eva, vi ja devetas* malpli fumi!

- Eh... nur tio ĉi restas al mi ankoraŭ en la vivo.

Vinaĵ silentis kun delikata rideto, kiun mi legis "nu, se vi ne povas deteniĝi, fumu". Ŝi enspiris ankoraŭ unu- dufoje kaj estingis la cigaredon je cindrujo.

Duonhoron pli poste ŝi estis jam sur la scenejo kaj ludis bonege. La iom aĝan ĵurnaliston, kiun la observitaj militaj teruraĵoj foligis, ŝi prezentis perfekte ne nur per la voĉo kaj movoj de la korpo, sed eĉ per majstraj tikoĵ en la vizaĝo. Ŝi gajnis fortegan, longan aplaudon, en kiu mi sincere partoprenis. Ĝuste tiam venis en mian kapon ideo aranĝi por ŝi specialan benefican programon. Kiam mi venonttage proponis tion al ŝi, mi rimarkis veran ĝojon en ŝiaj okuloj. Tiuj tagoj komencis nian longdaŭran interkorespondadon kaj ankaŭ denovan renkonton en Fridek-Mistek.

Laŭ mia varma peto ŝi promesis priskribi sian aktorinan agadon kaj fakte faris tion post ioma tempo en kelkaj leteroj. Pli poste, pro iuj al mi misteraj kialoj nia korespondado ĉesis kaj la leteroj kuŝis trankvile inter la aliaj korespondaĵoj. Sed kiam mi pripensis noti ĉi tiujn rememorojn, mi trarigardis diversajn materialojn kaj tiam la leteroj reaperis antaŭ miaj okuloj. Traleginte denove, mi trovis ilin tiel spontanaj, freŝaj, plenaj de specifa, unika etoso, ke anstataŭ verki ion pri Eva Semanova, mi decidis loki ŝiajn leterojn sensanĝe en la tajpaĵon. Tiaj ili aperas.

* **deveti** devi sed ne nepre, germ. **soll**, pole **powinien**

Estimata sinjoro kaj samideano!

Antaŭ ĉio alia mi devas humile pardonpeti, ke nur nun - post pli ol du monatoj - mi respondas vian leteron, kiu alportis tiom da vera ĝojo al mi. Tamen mi havas gravan senkulpiĝon - nome, mi transloĝiĝis kaj fakte ne sciis, "kien pli frue turni min" - mi havas nun belan, malgrandan sed komfortan loĝejon, sed vi ne povas imagi, kia laboro ĝi estis. Ankoraŭ nun ne ĉiuj formalaj estas solvitaj, kaj mi ne parolas pri ordigo kaj aranĝo de nova loĝejo. Kompreneble mi ne povis ĉesigi pro tio mian teatran laboron - kaj eĉ ne volus fari tion - kaj sekve ĉiam du, tri tagojn mi kuris tien reen en Praha de unu oficejo al alia, aŭ ordigis la loĝejon por ke ĝi estu loĝebla, kaj poste denove devis lasi ĉion kaj forveturi por teatraj ekskursoj. Kaj ili estas abundaj - de unu angulo al alia, dufoje lastatempe ni ludis en Slovakio (en Košice mi renkontiĝis kun viaj samlandanoj, kiuj ĝojigis min asertante ke mia laboro estas bone konata en via lando, kaj invitis min al Krakovo por la lasta tago de novembro kaj la du unuaj de decembro). Mi tute malzorgis mian tutan korespondadon, bedaŭrinde, kaj nur nun denove iom ordigas ĉion.

*Via letero enhavas multajn demandojn, mi provos respondi ilin. Do unue kio koncernas miajn versojn: mi ne opinias min poetino, absolute ne, mi estas nur simpla malgranda aktorino. Tamen mi volas almenaŭ iom kontentigi vin kaj mi do almetas kelkajn miajn provojn pri versfarado, nur por ke vi konvinkiĝu, ke fakte mi ne estas poetino. Pri tiuj, kiujn vi indikas en via letero, mi ne plu scias - ĉu vere mi iam "verkis" ion, kio nomiĝas **Virino** kaj **En pluva tago**? Ĉu vi ne eraras? Sed estas eble, mi ne plu memoras. Jes, miaj poemetoj estis de tempo al tempo presitaj, ĉar esperantistoj estas tre afablaj al ĉiu kaj toleremaj, tamen mi ne estas konvinkita, ke mia poezio multe valoras. Estas nur tiaj provoj. Ŝajnas al mi ke en "Sveda Esperantisto" estis io presita, ankaŭ en niaj Esperantaj gazetoj - sed precize mi ne plu scias tion, fakte ne. Mi provos, se vi deziras, ekscii tion. Ankaŭ ĉe ni iu okupiĝas pri Esperanta gazetaro, eble mi sukcesos. Se ne, vi devas kontentigi pri tio, kion mi al vi sendas kaj eble, se vi fakte ankoraŭ nun interesiĝos pri tio, sendos.*



En **Pigmaliono** de Șoă



En **La homa voço** de Jean Cocteau



En **La judino** de Bertold Breñt



En **La patrino** de Karel Čapek

Pri mia teatra repertuaro: mi almetas liston kun kelkaj informoj pri mia repertuaro. Mi nun fakte multe ludas por esperantistoj, dank'al dio, ĉar mi estas konvinkita, ke necesas ke aŭdiĝu desur la scenejo bona Esperanto, senerara kaj kun perfekta akcento. Mi ludis en Plzen, Roudnice, Pisek, Ĥeb, Havlíčkovi Brod, Usti nad Labem, Pardubice kaj aliloke. Kaj mi tre ŝatus veni post tiom da jaroj denove vian landon... kompreneble mi kore dankas pro via afabla invito kaj mi kredas, ke mi havos okazon por eluzi ĝin.

Nu, estimata samideano kaj amiko, ne koleru pro mia malfrua respondo, kaŭzita per fakte kromordinaraj cirkonstancoj. Kaj akceptu miajn korajn salutojn kun espero, ke vi pardonis min kaj respondos ne kun tia prokrasto, kiel mi.

Mi ĝojas je revido - espereble en via lando? - kaj mi samideane salutas.

Amike via

Eva Semanova

Estimata samideano!

Esperable vi ricevis jam mian unuan "riporton". En du, tri tagoj vi ricevos daŭrigon, ĝie stas jam preskaŭ preta. (Bedaŭrinde, ne ĉiam mi havas tiom da tempo, kiom mi bezonas por fini ĝin - mi devas skribi poparte. Do ne koleru.) Dume mi sendas kelkajn fotojn, por ke vi havu almenaŭ ioman imagon pri mia laboro teatra en Esperantujo.

Salutojn korajn!

via

Eva S.



Eva Semanova kiel sorĉistino en popola fabelo

Estimata samideano kaj kara amiko!

Plenumonte mian promeson donitan al vi en Opava mi eksidas por skribi al vi - ho teruro, pri mi mem. Sed mi avertas vin, ĉar estas io, kion mi ankoraŭ neniam faris. Ankoraŭ mi ne rakontis pri mi, kaj do mi ne scias, kiel mi sukcesos. Krom tio mi absolute ne scias, kio interesas vin, kie komenci - se vi dezirus, ke mi parolu pri la teatro, pri mia laboro aktora, pri beleco de mia patrujo, kiun mi ne ŝatas, sed adore amas travagante ĝin perpiede en ĉiuj liberaj tagoj, tion fari mi ne timus nek hezitus, sed pri mi... tia teda temo... nu, mi promesis kaj do mi provos. Mi petas, elektu nur tion, kio plaĉos al vi aŭ kion vi konsideros iel interesa - mi mem ne kapablas projuĝi tion.

Eble mi diru kelkajn vortojn pri mia deveno. Mi devenas el iu malnova itala nobela gento, kiu nomiĝis Scoberti - unu el grandaj italaj poetoj malnovaj, ŝajnas al mi ke estas Petrarka aŭ Dante, notas en sia verko tiun nomon, bedaŭrinde en tre mallaŭdinda senco - estis tute malalta nobelaro, sed des pli batalema, miaj antaŭuloj estis tre varmsangaj kaj incitiĝemaj senpripensuloj, kiuj ŝatis hazardajn ludojn, batalojn, virinojn - nu, nenion tre bonan oni povas diri pri ili. Ilia blazono estis glavo ĉirkaŭvolvita per rubando, sur kiu estis enskribite: **Victrix invicta** (Venkonto nevenkita*). Tiu emblemo pendis ankoraŭ en la granda manĝosalono en mia gepatra domo. Laŭdire, fine ili estis ekzilitaj el sia lando kaj vagante tra la mondo venis ĉi tien. Feliĉe, ĉar mi estus tre malfeliĉa kaj malkontenta, se mi naskiĝus aliloke ol en tiu ĉi belega, malgranda kaj amegata lando. La nomo Scoberti estis germanigita je Schubert. Mia patro, juristo kaj advokato doktoro Jan Schubert, havis ion el siaj antaŭuloj, sed nur tion bonan kaj belan. Li estis kavaliro adorata de virinoj - ankaŭ de mi, li verdire estis la unusola viro, kiun mi vere amegis - li rajdis ĉevalon, skermis kaj estis perfekta pafĉasanto.

Mia junaĝo estis iom neordinara: ankaŭ mi skermis, rajdis ĉevalon kaj pafĉasis (mia patro posedis du sufiĉe grandajn pafdistriktojn). Kiel mi jam diris, mi adonis mian patron. Jam kiel dekkarjara knabino mi akompanis lin en dumnoktaj ĉasembuskoj -

* ekzakte: venkintino nevenkita.

je kapreoloj. Mi rememoras pri tio, kiel mi pafmortigis mian unuan kapreolon, sed kiam ni kun la paĉjo venis al ĝi, ĝi ankoraŭ vivis kaj tiam mia patro devigis min mortigi ĝin per akra ponardo, por ke ĝi ne suferu longe. Mi tiam fermis la okulojn kaj enigis la ponardon en ĝian ezofagon. Mi asertas vin ke mi ne estas kapabla mortigi eĉ kristnaskan fiŝon, mi devas aĉeti ĝin jam porciigita, sed tiam estis io alia - mi estas ĉasistino kaj la patro diris, ke estus malhonoro ne mem mortigi beston, kiun oni fuŝe pafis. Do vi vidas, ke mi travivis vere neordinaran junaĝon, mi estis sovaĝa, duonknaba kaj tamen tre delikatsenta. Mi devas ankoraŭ menci, ke mia patro sopiris havi filon, sed havis nur du knabinojn, tial li la unuenaskitan - min - edukis kiel knabon. Tamen antaŭ ĉio li instruis min estimi tion, kion oni nomas honoro, kaj mi devas diri, ĝis hodiaŭ estas honoro por mi tio plej estiminda, tiu plej grava el ĉiuj homaj ecoj. Sed - ĉu mi ne tedas vin? Mi ja avertis vin, do nun vi devas elteni.

La aktoran talenton mi heredis de mia avino, patrino de la patro. Ŝi estis deksepjara, kiam mia kvindekjara avo edziĝis al ŝi - li estis militkuracisto en Moravio, posedanto de granda bieno kaj ofte vizitadis la kastelon, kie li estis konsiderata onta fianĉo de la juna grafino. Sed li faris skandalon edziĝinte al ties belega ĉambroservistino. Cetere tiu geedzeco ne estis feliĉa kaj finiĝis tragike, sed vi vidas, ke niaj sovaĝaj antaŭuloj influis forte siajn posteulojn kaj ke la atavismo vidiĝis klare je ni ĉiuj. Laŭdire mi eĉ tre similas al ŝi, sed tion mi ne kredas, ĉar ŝi estis dum sia junaĝo belega, mi neniam estis bela, eble nur iom alia ol ceteraj knabinoj, sed tion kaŭzis tiu atavismo kaj la nekutima edukmaniero de mia patro. Ankoraŭ mi devas diri al vi, ke mia patrino estis tute simpla knabino, filino de pedelo. Sed ŝi estis tre bela, nigrahara kun hele bluaj okuloj. Oni nomis ŝin "Kleopatra". Nun ŝi vivas jam longajn jarojn en Ameriko. Kaj mia amegata patro? Li estis el la unuaj, kiujn Germanoj dum la okupacio arestis kaj post du semajnoj ekzekutis. Mi estis tre malfeliĉa, mi pensis ke ankaŭ mi mortos, kaj tiam mi terure ekmalamis la faŝistojn kaj ĵuris, ke mi venĝos se mi vivos kaj ĝisatendos la finon. Kaj mi ankaŭ tion ĉi plenumis, ĉar dum la lastaj tagoj mi staris sur la bankadoj kun pafilo enmane. Menciinde estas, ke mi tiam estis graveda, preskaŭ antaŭ la nasko, kaj mi bedaŭrinde perdis tiun infanon - estis fileto...

Nu, eble tio sufiĉus por montri al vi, ke mia vivo estis iom nekutima. Eble mi seniluziigis vin, eble vi imagis min iom alie sed kion fari - jen la vero...

Kaj nun pri Esperanto. Ne, ankoraŭ mi devas menci, ke mi komencis studi la juron (mi volus sekvi mian patron), sed mi ne finis tiun studon, tamen mi havas la unuan ŝtatan ekzamenon. Poste mi faris la dramkonservatorion. Nu, kaj Esperanton mi ellemis mem, tute hazarde. En unu ĉefia urbo (Hradec Kralove) mi foje vidis en la montrofenestro de librovendejo libron, kies titolo estis **Blanka malsano**. Mi tuj ekmeditis, en kiu lingvo ĝi estas. Kaj mi diris al mi - mi komprenas la titolon, estas la **Blanka malsano** de nia Karel Ĉapek, kaj mi eniris la vendejon por demandi, en kiu lingvo ĝi estas. "En Esperanto", respondis la vendistino. Kaj tiam mi la unuan fojon aŭdis la vorton Esperanto. La libron mi aĉetis. (Ĝis nun mi havas ĝin) kaj tuj havigis lemolibron kaj vortaron kaj ellemis. Kiam mi jam parolis bone, mi konatiĝis kun Rudolf Hromada, kiu ekzorgis pri mi kaj fariĝis ne nur mia amiko, sed ankaŭ instruisto. Al li mi dankas mian - espereble perfektan - scion pri la Esperanta gramatiko. Li ankaŭ tradukis multajn ĉefiajn poemojn por mi kaj pro mi, ĉar mi komencis - estante aktorino - reciti ankaŭ Esperante. Ho, tiuj belaj tagoj de la juna fervoro! Mi havis multajn, multegajn korespondantojn eksterlandajn (unu el ili, Olaf Tormodsens el Norvegio, restis al mi ĝis hodiaŭ, mi recitis ĉiam kaj ĉie, eble eĉ troe - ĉar kiam oni estas juna, oni ankoraŭ ne kapablas kompreni, ke malpli estas pli kaj ke ne ĉiam tio plej bona estas bona. Nu, kaj vi scias jam, kiel estiĝis la Verda Ĉaro. Eli Urbanova tiam korespondis kun Julio Bagi kaj skribis al li pri mi, pri tio, ke mi recitas. Kaj li sendis por mi unuaktan teatraĵon (**La granda ludo**, ofte mi prezentis tion kun mia mortinta edzo Toni, foje ankaŭ en la ĉeesto de Bagi, kiu tiam vizitis Pragon) kaj mi dankis lin perletere kaj - kontakto estis ligita. Pli poste skribis al mi mia "paĉjo" Bagi: (... "mi revis pri organizado de aktora trupo por migre viziti la grandajn urbojn de la mondo kaj prezenti artajn vesperojn... mi volis organizi trupon kun la nomo Verda Ĉaro. Nu, intervenis la milito kaj... kaj nia revo restos por posteuloj, eble por vi... ĉu vi ne volus transpreni tiun taskon?" (La citaĵo estas laŭvorta el la letero de Bagi).

Sed tio okazis nur en la jaro 1954. Kaj mi komencis lerni Esperanton en la jaro 1949, en 1950 - precize post 9 monatoj - mi submetis min al ŝtata ekzameno en Karlovy Vary, ellaborinte antaŭe kiel hejman taskon el tri proponitaj temoj la elektitan **Historio de la ĉeĥa teatro**. Tiun skriban materialon prijuĝis dr Tomaš Pumpr kaj mi ricevis noton "eminente". Ekzamenintoj en Karlovy Vary estis dr Kamaryt, J. Vondroušek, Rudolf Hromada kaj la noto sur tiu mia diplomo estas ankaŭ "eminente kapabla". Unu jaron pli poste, en 1951, mi ricevis ankoraŭ unu diplomon, ĉi-foje en Doksy kaj estis diplomo de Cseh-instruisto.

Kaj en la sama jaro en Doksy mi estis premiita por mia poemo **Leter' al malproksimo**. Kaj memkomprene mi jam tiam multe recitis en Esperanto: ekzemple la 18-an de novembro okazis en Hradec Kralove vespero de Rudolf Hromada okaze de lia sesdekjariĝo, kie mi recitis, kaj en la praha klubo mi recitis preskaŭ ĉiam. En la jaro 1953 mi instruis en la somera kolegio en Libošovice en la Ĉeĥa Paradizo, ankaŭ tie mi aranĝis multajn artajn vesperojn: 15.8 vesperon de mia ŝatata poeto Franja Šrámek, kiu naskiĝis en la Ĉeĥa Paradizo (tiun vesperon mi ripetis poste en Prago) 9.8. vesperon el versaĵoj de ĉeĥaj poetoj **Poetoj kantas pri la amo kaj aliajn**.

Nu, kaj poste mi komencis prezenti ne sole poemojn, sed ankaŭ monologojn aŭ dialogojn, mi laboris kun mia edzo Toni Seman kaj eĉ laborigis kelkajn junajn (tiam) anojn de la praga klubo. La 3. de februaro 1954 ni okazigis - jam sur la scenejo de la "Malgranda Scenejo" en Praga-Smečky, kie tiam estis la kluejo, vesperon sub la titolo "Gloraj momentoj". En la sama jaro, do 1954, mi gajnis la kvinan premion en la beiarita konkurso en Harlem en la fako "originala poezio" por la poemo **Aktorino konfesas** (la diplomon mi memkomprene havas). La zamenhofan vesperon en la praga klubo mi kun mia edzo okazigis la 14-an de aprilo 1954. Kaj la 25-an de majo 1954 mi kaj mia edzo aranĝis - denove sur la "Malgranda Scenejo" - artisman vesperon estradan, tiam kunlaboris ankaŭ multaj estradaj artistoj profesiaj (mia edzo tiam estis kultura gvidanto de granda praga kabaredo kaj sekve ili faris tion por mi senpage). Tuj la 30-an de junio 1954 sekvis plua arta vespero "Vespero pri la teatro", kaj somere en tiu jaro mi instruis en Doksy en la somera kolegio.

Ankaŭ tie okazis multaj artaj vesperoj, ekz. 31.7. "Eterna Evo". Tiun vesperon mi ripetis por la praga klubo aŭtune en la "Malgranda Scenejo". Kaj ankoraŭ en la sama aŭtuno mi faris programon en Prago el niaj tradukoj (Hromada, Pumpr, Kořinek, Kamaryt, Lukaš). Tiu vespero okazis la 24. de novembro, kaj ankaŭ ĝi, la 5. de oktobro, alia vespero de ŝercaj dialogoj de nia J. Nêmec. Do vidu, ke mi fakte aktivis. Kiel mi jam menciis, eĉ tro. Ĉar mi notas ne ĉiujn tiamajn vesperojn, ankaŭ mi ne havas pri ĉiuj memoraĵojn, do mi elektis nur el tiuj, pri kiuj mi havas ankoraŭ programojn. Nu, kaj fine de tiu ĉi jaro, precize la 16an de decembro 1954, okazis la unua vespero de la "Verda Ĉaro de Julio Baghy". Pri tiu vespero mi havas belan dankleteron de nia tiama prezidanto Jaroslav Šustr, kaj de dr Kamaryt. Se tio vin interesus, mi sendos kopiojn. Entute mi havas sufiĉe da dokumentoj pri nia tiama laboro, bonvole skribu, ĉu io el ili interesus vin, mi ne volas ĝeni vin per longa skribado, kiu eĉ tiel estos tro longega.

Nu, kaj poste jam ekzistis la "Verda Ĉaro", ni okazigis vesperon "Pri la vivo, amo kaj morto" en 1955, samjare ni ludis en Hradec Kralove. Post tiu vespero skribis al mi la neforgesebla Miloš Lukaš jenon:

Neniam mi forgesos
pri la ĉi-jara marto;
eterne min impresos
la sorĉ' de via arto.

La 13-an de aprilo 1955 sur la "Malgranda Scenejo" estis zamenhofa vespero, la 9-an de julio ludis la "Verda Ĉaro" en Ostrokovice, decembre denove sur la "Malgranda Scenejo" ni ludis unuaktan dramon **La miraklo laŭ Ombro** de Nikodemi, kaj... sed mi ja ne povas tiamaniere daŭrigi, ĉar mi neniam finus. Simple mi ludis **Ĉe l' akvo de l' forgeso** de M. Boulton, **La patrino** de K. Čapek, **Mi esperas** de A. Seman, **Maryša** de la fratoj Mrštík, **Nora** de H. Ibsen, **Legendo pri la amo** de N. Hikmet, **Pigmalion** de G.B. Shaw.

Tion, kio ne estis originale verkita en Esperanto, mi mem tradukis: **La ombro**, **La patrino**, **Maryša**, **Pigmalion**, **Nora**. Kaj eble interesos vin, ke la **Legendon pri la amo** mi ludis en ĉeesto de Nazim Hikmet, kiu tiam estis en Prago. Mi ludis la ĉefan rolon

de Mechemene Banu, kaj post la prezento venis Hikmet sur la scenejon, diris - en brila franca lingvo - ke li jam aŭdis multajn tradukojn de tiu sia ludo, sed neniam tradukon en Esperanto, ke tio tre plaĉis al li, kvazaŭ li estus verkinta tiun rolon por mi, eĉ se mi ludis en lingvo por li nekomprenebla - kaj li metis en miajn brakojn grandegan bukedon da ruĝaj, longaj rozoj...

Kaj ke Julio Baghy estis intertempe en Prago, ankaŭ pri tio mi povus multe rakonti, kaj ke multaj Esperantaj gazetoj aperigis ne nur artikolojn pri mia laboro, sed eĉ presigis miajn versojn, ĉefe tiun vian ŝatatan **Najado**. La "Bulteno de Praha" aperigis ĝin en sia 32-a n-ro decembre 1955, "Norda Prismo" en sia kvara n-ro septembro-oktobro 1958... kaj en la jaro 1957 mi denove estis en Doksy.

Kaj poste ni estis invititaj kun **Pigmaliono** al Varsovio al la 44-a Kongreso kaj ni prezentis ĝin tie la 2-an de aŭgusto (dimanĉe) 1959. Kaj vi certe ne koleros, se mi pri tio rakontos en mia venonta letero, ĉar tiu ĉi estas jam tro, tro longa, kaj eble vi eĉ ne emus legi tion... kaj mi jam estas iom laca, pardonu. Sed estas bele tiel rememori, kvankam mi kutime ne emas fari tion - mi estas konvinkita, ke mi ne devas vivi el tio, kion mi faris, sed el tio, kion mi faras. Tial mi, kiel vi scias, laboras daŭre kaj senĉese. Sed ĉion mi diras al vi iom post iom - se mi jam komencis, mi tion finos, cetere tio plej malfacila, la plej malnovaj rememoroj pri faktoj, kiujn mi devis serĉi en miaj albumoj, estas jam preskaŭ malantaŭ mi. Do, portempe mi finas, se io speciale interesas vin, bonvole demandu. Min speciale interesus, kiel fakte plaĉis al vi mia rava olda frenezulino, en Opava. Diru! Mi poste ankaŭ pri tiu laboro rakontos. Estas interese...

Kaj nun mi deziras al vi "bonan nokton"

kaj ĝis!

Eva Semanova

Praha, 22.9.80

Bonan tagon, ŝatata samideano kaj amiko!

Vespere mi irontas al la klubo, por prezenti tie versojn de Jiji Karen pri via Friderik Ŝopen (**Serĉado de la blua tono**) kaj mi

havas nun unu aŭ du horojn liberajn, do mi daŭrigu la rakontadon. Traleginte mian antaŭan leteron mi miris, kiel facile kaj simple oni post jaroj esprimas tion, kio tamen signifis multan laboron, serĉadon, iluziojn kaj seniluziigojn... jes, ekzemple mi diras nun: mi tradukis **Pigmalion**. Sed kiom da laboro! Mi ne konas angle. Do mi laboris kun unu samideanino, kiu naskiĝis en Anglio, ŝi tradukis al mi ĉiun frazon en la ĉefian, precize, kaj mi poste klopodis fari la samon en Esperanto. La traduko plaĉis, mi cetere sendos al vi kelkajn kritikojn kaj komentojn el tiu tempo, kaj eble eĉ almenaŭ specimenon de la traduko. Kiom mi amis tiun rolon! Estas malfacila rolo ĉar Eliza Doolittle estas en ĉiu sia scenejprezento tute alia. Mi ludis tion kun entuziasmo kaj granda amo. Kaj vidu, post jaroj, kiam ni decidiĝis denove ripeti almenaŭ kelkajn scenojn (estis, ŝajnas al mi, antaŭ tri jaroj), tiam okazis la fama ĉiujara renkontiĝo tritaga en Melnik kaj ni prezentis tie kelkajn scenojn de Eliza kaj Higgins, Pickering kaj la servistino de Higgins (kun alia dommastrino, precize dirite), denove ĝi havis belan sukceson kaj rikoltis grandan aplaŭdon, ni poste prezentis tiujn scenojn ankoraŭ du aŭ trifoje en la praga klubo kaj por renkontiĝo de la junularo, sed kiam Dro Sadlo, kiu ludis sinjoron Higgins, petis min trastudi la tuton, mi rifuzis. Slavek (Dro Pravislav Sadlo) tiam koleris, sed mi ne plu volis ludi tion. Ĉar mi estas aktorino kaj povas ludi, bone ludi, nur tion, kion mi sentas, sed Elizan mi ne plu sentis. Mi ne plu estas juna knabino, mi povas roli tion, sed mi tamen ne sentas min en tiu rolo bone, mi ne scias, ĉu vi min komprenas - mi ĉiam sciis, estante sur la scenejo, ke mi aktoras, ke mi devas ludi tiel kaj tion - mi laboris jam nur teknike, sed la senton de juna Eliza mi ne plu povis trovi, ĝi ne apartenas al matura virino... Slavek tiam ŝerce diris: do, se vi ne volas ludi tion plu, mi trovos alian Elizan! - Kaj mi ridis kaj respondis: Se vi sukcesos trovi junan knabinon, kiu estos bonega esperantistino kaj same bona aktorino, mi gratulos al vi kaj ĝoje, kun vera ĝuo mem ludos la rolon de sinjorino Higgins - Ĉar tio estas belega rolo, kaj mi ŝate farus ĝin. Nu, memkomprene Slavek ne trovis aktorinon por Eliza, bedaŭrinde ni ne havas Esperantajn geaktorojn. Ankaŭ la Verda Ĉaro konsistis - krom mi kaj mia edzo - el amatoroj, kun kiuj mi laboris. Mi instruis ilin paroli, mi instruis al ili teknikon de la voĉ- kaj spiruzado, kaj la teknikon de la teatra moviĝo - estis granda laboro. Dio, kiom juna mi tiam estis! Kaj

imagu, ke mi loĝis tre malbone, en malgranda, malnova domo, kiu nun jam estas detruita, kaj en mia malgranda loĝejo ni provis ĉion - **Pigmalion, Nora, La patrino, Maryŝa, Legendo pri la amo...** ni ĉiam forigis la meblaron kaj provis. Mi rememoras, kiel nia ensemblo foje detruis mian liton... kaj krome mi neniam havis monon, ĉar - denove tiu atavismo - mi vivis ĉiam iom hazarde: mi ne scias ŝpari, mi kapablas per lasta monero aĉeti belan rozon kaj ne pensi pri tio, ke mi nek vesper- nek tagmanĝos, kaj ĉiam mi ludis senpage por esperantistoj, sed nun mi jam havas mian pension kaj do mi ne tiom devas zorgi. Mi ĉiam iel sentis, ke arton oni ne devus vendi sed donaci, kaj mi estas feliĉa, ke nun mi plene povas realigi multajn rekvizitojn, kostumojn k.t.p., kaj ni ne havis monon... feliĉe mi kaj mia edzo sciis helpi nin. Preskaŭ ĉion ni faris mem, mi scias iom pentri (kiel juna knabino mi iom lernis pentri ĉe unu nia pentristo, nur mallonge, mi absolute ne estas talento, sed por la teatra bezono tio sufiĉas kaj mi ankaŭ okupiĝas pri mane farata arto, ekz. mi laboras pri ligno, ŝtofoj, iomete scias skulpti - tute primitive, sed por la teatro tio helpas. Ĝis nun mi faras ĉion por mi mem, la rekvizitojn, kiujn vi vidis en Opava (la papilireton, la tambureton) mi ankaŭ faris mem, ĉar tio nuntempe absolute estas ne havebla en vendejoj. Nu, pri tio, kiel mi laboris, mi ankaŭ parolos, nun mi iom rakontu pri la prezentado en Varsovio.

Estis por ni ĉiuj granda bonŝanco, ni estis tre fieraj kaj feliĉaj, kiam via ministerio de kulturo invitis nin prezenti **Pigmalion** dum la kongreso en Varsovio. Kaj krome mi neniam estis ekster la limoj de mia patrolando, do mi estis tre ekscitita kaj mi tre ĝojis. Tiam ankoraŭ ne estis facile veturi kun arta kolektivo eksterlanden, eĉ se estis al Pollando, kaj multfoje ni senesperis, jam ni ne kalkulis kun nia ĉeesto kaj rezignis, ĉar nia ministerio tiam ne volis lasi nin veturi. Sed des pli granda estis nia ĝojo, kiam fine ĉio ordiĝis kaj ni tamen ekveturis. Kiom ni provis, denove kaj denove, kvankam la ludon ni jam kelkfoje prezentis. Nun, se mi veturas ludi, mi simple preparas mian pakajon kaj ekveturas, sed tiam... jes, nur unufoje en la vivo oni estas juna kaj kvankam mi nepre ne dezirus revenigi mian junecon (multon mi devis de tiu tempo travivi, trasuferi kaj dolore trasenti por fariĝi almenaŭ iom bona aktorino), tamen mi devas konfesi, ke estis belaj tempoj. Krom tio mi havis kuraĝon,

kiun mi ne plu posedas. Ĉar tiam mi absolute ne povis scii, kio estas vera arto, mi nur pensis, ke mi tion scias, nur mi kaj neniu alia plu, kaj do mi kuraĝis multon, kion mi nun ne kuraĝus, ĝuste pro tio, ke mi jam scias, ke ne kuraĝo sed dura laboro, peno, doloro kaj sufero faras aktorinon. Nun mi ĉiun vorton en mia rolo devas trasuferi, multfoje kaj multoble, fortan respondecon mi sentas al la estaĵo komence ne konata, kiun mi pene, iom post iom alproprigas por doni al ŝi vivon kaj parolmanieron kaj movojn, tiajn, ke oni povu kredi ŝin - mi ne scias, ĉu mi esprimiĝas klare. Sed eble vi komprenos...

Mi rememoras pri ŝerca okazintaĵo, kiam mi alveturis al la limo. La oficistoj petis nin malfermi niajn valizojn, kaj - aperis teruraj ĉifonoj de Eliza kaj de ŝia patro. Ili ektimis kaj ni klopodis klarigi, ke ni veturas por teatra prezentado. Kaj mi forgesis en la valizo mian rolon, prozice dirite ne forgesis, mi intence metis ĝin tien, la tekston de mia rolo, eĉ ideo ne venis al mi, ke tio povus fari malfacilaĵojn. Kaj tamen kaŭzis. La doganistoj trovis maŝin-skribatajn paĝojn, la tekston ili ne komprenis, do ili kunprenis tion kaj la vagonaro devis atendi sufiĉe longan tempon, antaŭ ol ili redonis al mi mian rolon. Mi ne scias, kiamaniere ili klopodis ekscii, kion enhavas la teksto, eble ili ien telefonis aŭ io, nu fine ni daŭrigis kaj ĉio estis en ordo.

En Varsovio mi sentis min kvazaŭ en alia mondo, ĉar estis, kiel mi jam diris, mia unua vojaĝo eksterlanden. Sed kiam ni venis en la kulturan domon, por fari provon sur scenejo - nu, ni ĉiuj terurigiĝis. La scenejo havas 16 metrojn! Kaj ni kutimis ludi sur tute malgranda scenejo. Do ni devis ĉion denove aranĝi kaj kutimiĝi al multe pli granda spaco. Por mi tamen ne estis tiom malfacile, sed miaj kunaktoroj estis ja amatoroj, por ili estis vere malfacilega tasko paciĝi kun tia spaco. Nu, la prezentado ege sukcesis, tion vi ja scias. Jam post la unua sceno de Eliza la aŭskultantaro entuziasme aplaŭdis, kaj mi forkuris el la scenejo, por ŝanĝi la veston (Eliza ĉiam ŝanĝas la kostumojn, neniam plu mi rolis en tiom da kostumoj, ŝajnis al mi, ke mi devos halti kaj surgenue danki por tiu unua aplaŭdo, ĉar estis proksimume 4000 aŭskultantoj el 34 landoj diversaj - kaj ĉiuj komprenis, ĉiuj aplaŭdis! Tre emociita mi estis. Ankoraŭ okazis al mi multaj - mi diru neatenditaĵoj, ekz. kiam Eliza iras ŝanĝi kostumon por parto-

preni edziĝfeston de sia patro, tiam ŝi estas jam bone edukita kaj nepre ne devas kuri, sed la ceteraj aktoroj dume parolas nur kelkajn frazojn, do restis al mi nemulte da tempo por ŝanĝi kostumon, kaj tiuj amatoraj aktoroj forgesis, aŭ eĉ ne konsciiĝis, ke la scenejo estas longa kaj ke mi bezonos pli multe da tempo por trairi - kaj post la scenejo mi kuris, estis tie ankoraŭ tia vitra pordo, mi enfalis jam preskaŭ nuda kaj neniun atentante mi nur kriis: rapide, la kostumon, la tolaĵon, la ĉapelon - kaj tenante ĝin en la mano mi enfalis la scenejon precize post la lasta frazo, se mi venintus nur momenton malpli frue, jam "elkreskus sur la scenejo palmo", do io tia ne okazis, la prezentado finiĝis brile kaj mi ricevis bukedon da longegaj, malhelaj viole ruĝaj gladioloj, ĉiuj estis unukoloraj kaj pli longaj ol mi, mi neniam forgesos, kiel mi staris sur tiuj 16 metroj de la scenejo kaj tenis antaŭ mi tiujn florojn kaj la amfiteatro aplaŭdis, aplaŭdegis, kaj mia gorĝo estis prempremita, mi volis ridi sed grandaj larmoj de feliĉo ruliĝis desur miaj vangoj kaj mi estis feliĉega pli ol eblas diri... jes, tiajn travivaĵojn oni neniam forgesos. Sed ĉu mi ne rakontas tro longe? Nu, forĵetu tion, kio por vi ne taŭgos. Vi estos la unusola en la mondo, kiu havos iom komplete kolektitajn travivaĵojn de Eva Semanova sur la verda scenejo en ŝia dua, verda patrujo...

Entute la semajno, pasigita en Varsovio, estis por mi nur bela sonĝo. Mi prezentis mian **Pigmalion** tuj komence, dimanĉe vespere, kiel solenan ĉefan prezentadon kaj la tutan sekvan semajnon mi trasentis tion, kio signifas "esti stelo". Jes, mi fariĝis steleto de la kongresanoj. Kie ajn iu renkontis min, jam komencis krii: "Eliza!". Mi memoras kiel mi estis kun mia Toni en la kriptoj de Sienkieviĉ, kaj mi enpensigis en tiu trankvilo... sed subite venis kelkaj kongresanoj kun akompananto, kiu parolis pri la granda verkisto. Nu, kaj iu el ili rimarkis min. "Eliza!" - aŭdiĝis tuj en la kriptoj kaj neniu plu atentis la vortojn de la akompananto...

Alia neforgesebla travivaĵo: frumatene, povis esti la kvina, mi ellitiĝis por viziti... nu tiun ejon. Mi iris nur en mia nokta pijamo, ĉie sur koridoroj estis nokta trankvilo (ni loĝis en la oka etaĝo en granda hotelo) kaj kiam mi eliris el tiu ejeto, staris antaŭ ĝi du gejunuloj kun krajono kaj albumeto kaj tre estimplene petis min pri subskribo, mi rapide faris kaj foriris, sed nun, post tiom da jaroj, la komikeco de la situacio tiom klare vidiĝas antaŭ miaj okuloj, ke nur nun mi kore kaj sincere ridas rememorante tion...

Estas vespero - kaj nur hodiaŭ mi sukcesis trovi denove momenton por daŭrigi. Matene mi forsendis por vi kelkajn fotojn, espereble vi jam havos ilin enmane, kiam atingos vin ĉi tiu letero.

Do, kion ankoraŭ diri pri Varsovio? La impresoj estis neforgeseblaj, kaj tamen paroli pri ili estas malfacile, ĉar ĉiu vorto estas iom pala, neniu havas sufiĉas forton por konvinki pri la veraj impresoj el tiu mia unua eksterlanda teatra ekskurso. Memkomprene, tie estis ankaŭ mia amata "paĉjo" Julio Baghy, kaj tiu fakto ankoraŭ multobligis mian feliĉon. Mi tiam estis ĉiam sufiĉe okupita, ĉar oni postulis jen intervjuon por iu gazeto, jen tujan interparolon por radio-elsendo, mi memoras ke en unu tago, veninte en la kongreshalon, mi renkontis la "paĉjon" Baghy kaj li komencis kun sia kutima entuziasmo krei: "jen vi estas, bonege, venu tuj, oni serĉas vin kaj mi promesis trovi vin" kaj laŭvorte min trenis inter la homamaso ien, kie atendis jam unu knabino kaj ŝajnas al mi du knaboj kaj ili tuj enmanigis al mi skribitan demandaron kaj diris - rapide tralegu tion kaj pripensu la respondojn, vi havas nun jam nur dek minutojn, poste oni elsendos kun vi la rektan intervjuon el radio... kaj similaj surprizoj okazis... estis bele... simple mi rikoltis sukcesojn... sed, kara amiko, inter ni dirite, mi hodiaŭ estas certa ke almenaŭ duono de tiu sukceso apartenis al miaj juneco kaj beleco, (ĉar ĉiu juna knabino estas bela, ĉu ne?) kaj ne al mia arto. Hodiaŭ, se mi sukcesas sur la scenejo, mi sentas, ke tio jam estas vere merito de mia laboro, ĉar mi estas jam maljuna kaj - nu, diru mem, ĉu iu povus admiri tian en ĉifonojn vestitan frenezan maljunulinon, tute eluzitan kaj kadukan, kian mi prezentis en Opava? Oni sentas nun jam sole la forton de la arto, kaj tiel estas bone. Mi estas tre kontenta, ĉar mi scias ke nepre ne estas mi, kiun dorlotas la publiko, sed nur la arto, la forta impresio, kiun alportas la ludo... sed pri mia nuna laboro mi parolos, mi devas sekvi mian artan vivon paŝon post paŝo, se mi jam decidiĝis rakonti pri ĝi.

Do ankoraŭ ni estas en Varsovio, sed nemulte jam restas por rakonti. Mi kun la edzo "ŝtelis" unu tagon kaj ekskursis al la maro, ĝin mi kompreneble vidis ankaŭ la unuan fojon, kaj kuris al ĝi por leketi la akvon kaj gustumi, ĉu vere ĝi estas saŭsa... kaj trinkis bonegan nigran kafon en malgranda kafejo kaj fiere mendis "duĵom ĉnom kavom, proŝe" (mi skribis laŭsone kaj komike, mi

scias, sed same komika mi estis tiam, eĉ pli ĉar tiam mi ŝajnis min damo - same kiel Eliza - dume nun mi ridetas pri la naiva junulino de tiuj tempoj - kaj mi poste estis invitita de via tiama ministro por kulturo, kiu laŭdire estis esperantisto, partopreni la solenan recepcion* adiaŭan en la Palaco de Kulturo. Kaj ĉio estis rava, mi manĝis tie multegajn glaciaĵojn, ĉar ĉiuj klopodis servi min per io kaj ĉie demandis, kion mi deziras, kaj mi diris "glaciaĵon", kaj manĝis kaj manĝis, ĝis mi preskaŭ glaciigis. Estas memkomprena fakto, ke mi trarigardis la urbon, ties memoraĵojn, kaj mi veturis senĉese per taksioj (ankaŭ kiel Eliza), ĉar tio estis pli oportuna kaj preskaŭ malpli kosta ol la tramo. Sed ĉio bela finiĝas - kaj ankaŭ la rava semajno maldaŭris... ankoraŭ unufoje en mia vivo mi ŝatus veni Pollandon, Varsovion, kaj denove ekstari sur la 16-metra scenejo de la Kultura Domo... nun, post tiom da jaroj... kiam mi estas jam matura aktorino, kun iom ironia kaj iom nostalgia rideto rememoranta tiun stultetan, kuraĝan, memfidan junulinon, kiu foje rolis Elizan Doolittle... nu, kara amiko, por hodiaŭ sufiĉe, venontfoje mi daŭrigos. Ne timu, se mi jam tiel komencis, mi daŭrigos ĝis fino, se tio havas por vi ian valoron. Do, bonan nokton por hodiaŭ...

Amike via

Eva Semanova

*receptio akcepto

Pri ŝi nur admire

La budapeŝta Universala Kongreso de Esperanto en 1966 havis en sia teatra programo unuaktoran spektaklon **La eta princo**. Rolis en ĝi Jadviga Gibĉinska (Gibczynska), pola aktorino, kiun mi tiam ekvidis unuafoje, kaj rolis bonege. Eblis tuj rekoni, ke ŝi estas profesia artistino, inicita en ĉiujn sekretojn de la aktora profesio kaj kutimiĝinta "vivi sur scenejo". Ŝi rikoltis tondran, longan aplaŭdon. Sed kiam mi ekintencis aliri ŝin kun gratuloj, subite eta incidento bremsis min antaŭ la scenejo. Jen iu bulgarino, jam ne troe juna, venis al la aktorino kaj per insistaj gestoj petis ŝin pri io. Gibĉinska gvatis ŝin mire, ekridetis, kaj poste prenis je brako kajgvidis al la mezo de l' scenejo.

- Karaj gesinjoroj! - ŝi diris al la publiko - Jen sinjorino (mi ne plu memoras la nomon) deziras reciti al vi iom da poezio.

Kaj la bulgarino komencis. Per laŭta, akra voĉo kaj dealaj* emfazaj ekkrioj ŝi esprimadis sian senliman adoron al la Majstro, al nia kara lingvo Esperanto, al feliĉa estonto de l' homaro, kaj interpopola amo. La aŭskultantoj spektis mirigitaj, post kelka tempo iomete ekmoviĝis, kaj poste unu post alia leviĝis, direktante sin al la pordoj. La antaŭa silento evoluis je bruo, en kiu la voĉo de la recitantino fariĝis nekomprenebla, poste eĉ ne plu aŭdebla, sed ŝi recitis plu. Post kiam parto de la publiko eliris, ŝi rekonsciĝis, kelkan tempon gapis mire la salonon, kaj foriris de sur la podio. Mi komplete observis ŝian belan sonĝon tiel krude ŝiritan. Anstataŭ porti hejmen rememoron pri kortuŝa recito al amasa internacia publiko, ŝi portis amaron de fiasko. Laŭ ŝi certe ne merititan.

La incidento pensigis min pri la konduto de la elstara aktorino. El dek similaj, supozeble plejparto ironie ekridetus kaj rifuzus prezenti la bulgarinon al la publiko, geaktoroj ja ne ŝatas konkurencon. Gibĉinska ne rifuzis, ne moketis, sed favore helpis, montrante tiel unu trajton de sia personeco.

Kun la aktorino mi tiam ne interkonatiĝis, ĉar dum la kaoseto ŝi malaperis, kaj mi devis atendi multajn jarojn la personan renkonton, sed kiel aktorinon mi spektis ŝin multfoje, ŝi ja estas tre aktiva en la Esperanta teatra vivo. La plej aktiva - laŭ mi - kaj an-

* deala de temp' al tempa

kaŭ la plej longe fidela al la Esperanta teatro, el ĉiuj ĝisnunaj geaktoroj. Ja multaj aktivis kiel esperantlingvaj artistoj nur dum pli aŭ malpli longa sed ĉiam limigita periodo en sia aktorado. Plejparte ili venis el nacilingva teatro kaj al tia revenis. Gibĉinska, ankaŭ pollingva aktorino, komencinta roladi Esperante en 1964, aktivis ĝis nun, kaj mankas simptomoj ke ŝi ĉesos.

Supozeble, la fortan inklinon al la arto greftis en ŝin jam la gepatra hejmo, kaj precipe la patro - licea profesoro, homo vaste edukita, eminenta konanto de la literaturo, zeloto de la antikva kulturo, pursanga humanisto. En la domo, kiun li estris, ne eblis esti indiferenta por la scienco kaj arto, ne mirinde do ke la filino elektis studojn en la krakova teatra atleernej. Ŝi finis ilin en 1949, kaj ekstaris sur vojkruc: kian vojon elekti? Ĉu resti por daŭre en Krakovo, enkreski la urbon kaj atendi je valoraj proponoj, aŭ ĉu ekmigri, ŝanĝadi teatrojn, serĉi senpacience?

Al Jadviga inerto estis fremda. Ŝi akceptis postenon en la vrocłava teatro gvidata tiam far elstara reĝisoro Henrik Ŝletinski (Henryk Szletyński). Poste sekvis teatroj en Kaliŝ, Lodzo, denove Vroclav, poste Teatro de la Bordo en Gdansk, disponanta fakte pri du scenejoj, kaj ekde 1966 teatro en Kielce. Kaj ĉie ŝi rikoltis favoregajn recenzojn:

"(...) Klara personeco de la eminenta aktorino Jadviga Gibĉinska, kion ni povas diri plej respondece, - deklaris la ĵurnaloj en Kielce - altiras la atenton same sur scenejo, kiel ankaŭ ekster ĝi. En la sceneja lumo ŝi fascinas per sia talento, ekster la teatro ŝi impresas per siaj persona ĉarmo kaj aŭtenta kulturo (...) Ŝi rolis en multaj teatraĵoj, montrante konon de la homa psiko. En la ŝekspira **Vivo kaj morto de reĝo Johano** ŝi estis Konstance, en **Frank V de Dierenmat** - Freda First, en **Platonov** de Ĉeĥov - Anna, en **Amfitriono 38** de Ĵirodu (Giraudoux) - Alkmena, fraŭlino Maliĉevska en la samtitola dramo de Zapolska, Julka en **En kaptilo** de Kojenniovski, Bronka en **Neĝo** de Pjibiŝevski (Przybyszewski, Korzeniowski). Ŝi estas sendube la plej elstara ano de la teatra teamo en Kielce."

Nu, la recenzisto citis ne ĉion. Ŝi brilis ankaŭ kiel Kitty en **The time of Your Life** de Sarojan, en **Kariero** de Eva Otvinovska, **Venĝo** de Fredro, **Porviva rento** de la sama aŭtoro, **La stulta Jakobo** de Ritner, **Kabalo kaj amo** de Ŝiler, kaj multaj, multaj aliaj.

Ne mirinde do, ke post dekelkaj jaroj alia recenzisto, ĉi-foje en Gdansk, skribis triste: "mi ofte cerbumas, kio okazis kun la aktorino Jadviga Gibĉinska kiu en paseo ravigadis nin sur scenejo de la sopota* Kamera Teatro."

Kio okazis? Fakte nenio, ŝi ludis sed diversloke. Eĉe ŝi estis pollingva aktorino ĝis la jaro 1974-a, en kiu ŝi emeritiĝis, sed tio ne signifas ke ŝi ĉesis ludi. Kiel pollingva aktorino ŝi aktivigas ĝis hodiaŭ, kvankam ne tiom ofte, tamen komence de la sesdekaj jaroj ŝi ekroladis ankaŭ en Esperanto. La jam citita recenzisto skribis, ke "ŝia ĉefa pasio estas Esperanto. Jadviga Gibĉinska eminente regas tiun lingvon (...) Sufiĉas diri ke en 1964 en Hago kadre de Universala Kongreso de Esperanto ŝi prezentis la monodramon **Vojaĝo al verdaj ombroj** (...)" Tiel komenciĝis ŝia kariero sur verdaj scenejoj.

Ĝis nun ŝi preparis dekelkajn programojn kaj prezentis ilin dum la universalaj kongresoj en Hago, Budapeŝto, Kopenhago, Lucerno, Vankuvero, Tokio, ŝi entreprenis artvojaĝon tra Britio, Danlando, Norvegio, Svedio, Bulgario, Hispanio, Italio, Jugoslavio kaj Japanio.

La toka kongreso havis por Gibĉinska apartan signifon: jen oni invitis ŝin al Kameoka, por ke - en kadre de poezia festivalo - ŝi recitu tie versaĵojn premiitajn en la belarta konkurso. Tiutempe la terminoj Oomoto kaj Kameoka sonis por ŝi tute fremde, ĉar ŝi aŭdis nek pri la kulturcentro mem, nek pri la spirita doktrino, sed ŝi konsentis veni, temis ja pri aktorina tasko.

La kelkaj tagoj pasigitaj en Kameoka impresis ŝin preskaŭ magie. Ŝi estis tie en 1965, kaj pri siaj travivaĵoj ŝi rakontis al mi en 1994, sed malgraŭ tia tempa distanco ŝi ekzakte memoris ĉiun detalon, ŝiaj okuloj brilis fascinite, kaj ĉefine ŝi profunde suspiris:

- Kiel mi dezirus esti tie ankoraŭfoje kaj ankoraŭfoje ĉion travivi. Nu, sed tio certe ne ripetiĝos!

Mi aŭskultis silente, evitante ŝiri ŝian revon.

Ĝustas emfazi ke la japanoj en Kameoka aranĝis la tutan programon perfekte. Preciza preparo, glata realigo ekde la komenco ĝis la fino, serioza trakto de ĉiuj partoprenantoj kaj ĉiuj ceremonioj, amika zorgo pri la artistino - ĉio povis esti modelo kaj imitinda ekzemplo por la tuta Esperantio.

* **sopota** de Sopot, apudmara urbo

- Kameoka-n mi forgesos neniam! - finis Gibĉinska kun kortuŝo.

Laŭ fluo de l' tempo ŝi mergiĝis en la esperantlingvan aktoradon pli kaj pli. Post 1964 ŝi deale sed permanente petis forpermesojn por aktori en Esperanta aranĝo. La bazaj teatroj pli-malpli volonte konsentadis, sed fine venis ribelo:

- Ĉu vi estas en la teatro, aŭ ĉu vi estas en Esperanto? Kial vi ne zorgas pri via propra pano?

Eĉ okazadis, ke ŝi rezignis en unu teatro, ĉar dua promesis doni forpermesojn. Ĉio dependis de la direktoro. Unu komprenis ke lia aktorino volas ludi kaj per eksterlandaj prezentoj firmigi sian aktorinan rangon, alia postulis ke ŝi plene plenumu la devojn fiksitajn en la kontraktoj. Kaj ŝi baraktadis inter limoj de la risko. Ĉi tio daŭris ĝis la jaro 1974, kiam ŝi emeritiĝis. Memkomprene, ŝi ne ĉesis, kiel jam dirite, roladi pole, sed nun ĉio dependis de ŝi mem, la decidon ŝi havis en siaj manoj.

Pli oftaj prezentadoj kaŭzis bezonon pligrandigi la repertuaron, je ne eblis veturadi al ja nemultnombraj esperantistaj medioj kun la sama programo. Gibĉinska decidis mem prepari programojn. El fikciaj monologoj de tri virinoj apudaj al Zamenhof - la patrino Rozalia, la edzino Klara kaj la filino Lidia - ŝi kompilis la spektaklon **Zamenhof**; surbaze de memorkajeroj, leteroj kaj la biografio de Maria Kiri (Curie), verkita far ties filino Eva, naskiĝis la programo pri la fama sciencistino, dufoja Nobel-premiito, **Maria Kiri**; el distraj monologoj de virinoj naskiĝis gaja programo **La febla sekso**, kaj versaĵoj de Sapfo, fama greka poetino el la VI-a jarcento a.K. fariĝis fonto de arta programo **Ludilo de dioj**.

En la lastaj jaroj Jadviga Gibĉinska direktis sin ankaŭ al instruado, ne nur en Pollando, sed ankaŭ ekster ĝi, precipe en Svedio kie ŝi pasigis kelkajn monatojn.

Ĉi-jare (1994) ŝi travivas siaspecan jubileon - tridekan jaron de sia esperantlingva aktorado. Dum tiuj tridek jaroj ŝi evoluis je granda Esperanta aktorino, ĝis nun senekzempla. Multaj geaktoroj diversnaciaj rolis sur la verdaj scenejoj, sed neniu fidelis al ili kelkajn jarojn, neniu atingis tiajn rezultojn. Sufiĉas, ke ŝi suriras la scenejon, kaj baldaŭ komenciĝas magia efiko je la publiko. Efiko, cetere, per tre ŝparaj rimedoj, sen spektakleca gestado, sen troa moviĝemo. Ŝiaj gestoj estas subtilaj, la movoj elegantaj, sed kio forte efikas - estas la voĉo. Majstre regata, modulata vaste sed fa-

cile, kaj ĉiam adekvata al la prezentaĵo.

En Budapeŝto, ekzemple, ŝi prezentis du dramojn absolute malsamajn, kaj - konsekvence - en ĉiu ŝi estis absolute alia virino. Perfektan eblecon por tiuspecaj ŝanĝoj disponigas la monodramoj **Zamenhof** kaj **Vojaĝo al verdaj ombroj**.

Eminentaj rolantinoj sur scenejoj, Jadviga Gibĉinska restas ĉarma virino ekster la teatro: kun profunda humanisma kulturo, kun propra ĉarmo, afableco, ŝi reprezentas aristokration de la spirito. Ne kapablante pli bone esprimi mian admiron al ŝi, mi esprimas ĝin per kelkaj poeziaj frazoj:

Sur scenejo

Disiĝas la kurten'. En lumo feble gliima,
kun muta korpo de ludonto pantomima,
kun la vizaĝo de antikva monumento,
sen eĉ plej eta gest', sen spuro de la sento
ŝi staras face en la mezo de l' podio.
Aŭdiĝas en silent' mallaŭta melodio,
ŝvebas tra la aer' sentveke, lirle mola,
simila al susur' de foliar' tremola,
kaj per la dolĉa son' la aktorinon vekas:
ŝi ekmoviĝas jen, rigarde vivi ekas,
gvatas al la spektej', simule ŝi hezitas,
kaj jen per softa voĉ' trankvile ekrecitas.

Mirinda, sorĉa voĉ'! Komence delikata,
subtile mildas ĝi kiel vort' karitata,
sed iom post iom varmiĝas ĝis la ardo
kaj flamas kiel voĉ' de insurekta bardo,
por post nelonga temp' denove nure gliimi,
ree trankvili, kaj susuri, kaj sublimi...
Kapablas tia voĉ' superbi kaj irizi,
vibri pro emoci', kondamni, kanonizi,
jubili en feliĉ', en tristo softe plori,
Trumpeti al batal', sub mortobat' angori,
rakonti pri la am', humiloplene preĝi,
obei al ordon' aŭ suverene reĝi.

Homo sen hipokrita masko

Antaŭ ol interkonatiĝi kun li persone, mi bone konis lin laŭ multnombraj versaĵoj, originalaj aŭ tradukitaj, aperintaj en diversaj revuoj. Lia nomo ofte troviĝis inter premiitoj de diversaj literaturaj konkursoj kaj aŭdeblis de sur scenejoj kaj podioj en teatraĵoj kaj poeziaj programoj. Sed persone ni interkonatiĝis en la sepdekaj jaroj en Opava, dum unu el la artaj festivaloj organizataj en tiu urbo okaze de solenaĵoj por la elstara ĉeĥa poeto Petr Bezruč. La ĉefa aranĝanto de la Esperanta programo estis Vlastimil Kočvara, inĝeniero en la uzino Ostruj, pli poste prezidanto de la ĉefa estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Jiĝi Kojĝnek - ja pri li temas - proksimis tiam al sepdekjariĝo sed korpe estis vigla kaj mense juna. Dum tri festivalaj tagoj ni kelkfoje diskutis, eĉ longe babilis, kaj ekde tiam niaj kontaktoj ne ĉesis. pere de Kojĝnek mi interkonatiĝis ankaŭ kun la elstara ĉeĥa tradukisto esperanten - Jozef Vondroušek.

Kojĝnek ĉiam estis zorgeme vestita, ŝtofojn li portis altkvalitajn, kies sekreto mi baldaŭ ekkonis: li profesie laboris kiel kvalitat-kontrolisto en teksta industrio. Ankaŭ lia edzino estis virino eleganta, belstatura, kaj parenteze ĝustas diri ke ŝi bone parolis Esperanton. Sed mi ekkonis ŝin multe pli poste.

En Opava dum bela posttagmezo mi paŝis lante laŭ la strato direkte al la urbomezo, kaj jen iu alparolis min de malantaŭe. Mi turniĝis: Kojĝnek!

- Kien vi iras, se licas demandi?

Mi ekhezitis, ĉu diri veron. Tiame en Ĉeĥoslovakio la kontraŭ-religia premo estis tre forta, mi ne sciis, kiel rilatas Kojĝnek al la religio, ĉu li vizitas preĝejon aŭ ne, ĉu li kaŝas tion, ĉu ne kaŝas... Sed mi pafis:

- Mi iras gvati je kioma horo oni morgaŭ celebros mesojn.

Kojĝnek ekridetis feble, kaj diris:

- Nu, do ni iras la saman vojon ĉar mi celas la samon.

La situacio klariĝis, ni paŝis lante laŭ la longa vojo kaj interbabilis. Iumomente el mia buŝo elflugis mencie la nomo Novobilski. Kojĝnek gvatis min scivole:

- Ĉu vi konas lin? - li demandis.

- Persone ne, sed li publikigas literaturhistoriajn skizojn.
- Mi konas lin tre bone. Eĉ pli...
- Eĉ pli? Kion ĝi signifas?
- Estas mia bofilo.
- Dio mia! - mi surpriziĝis - do vi havas tute esperantistan familion.
- Tiel estas, ĉar ankaŭ mia filino parolas Esperante.
- Havante tian edzon!
- Sed ŝi lernis ne de li.
- Do de vi!
- Ankaŭ ne.
- Mi denove ne komprenas.
- Ili kune partoprenis kurson, ankoraŭ kiel gefraŭloj.
- Kaj eble tie interkonatiĝis.
- Jes, ĝuste tie.
- Nu, certe la destino direktis ilin tien por ke Amoro povu pafi ilin per siaj sagoj.
- Supozeble? Kaj ĉu vi scias, kiel lernis Esperanton mia edzino?
- Nu?
- Mi instruis ŝin ne nur hejme. Kiam ni ekskursis, kaj ni faris tion relative ofte, mi elbuŝigis nek unu ĉeŝan vorton. Nur Esperantajn. Ekzemple, montrante ŝtonon mi diris: "ĝi estas ŝtono". Aŭ "ĝi estas herbo", "ĝi estas mirtelo". Ĉu vi ŝatas mirtelojn?" Kaj tiel plu.
- Efika metodo, se juĝi laŭ la rezultoj.
- Tre efika, kvankam iome tirana.
- Nu, tiame ŝi eble grumblis sed nun ŝi certe kontentas.
- Evidente.

Kun Koĵinek estis agrable diskuti ĉar ni havis similajn opiniojn pri la poezio, precipe pri la moderna. Liaj vortoj

*Se l' modernaj (poetoj) do fieras
pri la versrebusoj,
ili pravu, sed preferas
mi en miaj uzoj
klaran penson, fiksan verson,
formon neprozecan...*

ne estis nura babilero, sed firma, stabila konvinko. Ankaŭ mi ĉiam opinias, ke poeziaĵo devas havi almenaŭ iujn el la poeziaj ecoj distingantaj ĝin disde prozo. Se ĝi havas eĉ ne unu, ĝi estas simple prozo iom aliel dismetita sur paĝo. Cetere, en nia tempo tia

poezia prozo travivas florperiodon sed, aliflanke, ĝi kreas tre bonan grundon por plimultiĝo de grafomanio. Ne devante rimigi kaj ritmigi la versaĵon, sentante sin liberigita de ĉiuj rigoroj de la poetiko, ĉiu posedanto de postaĵo sidiĝas kaj kreas poezion.

Koĵinek opiniis same, tamen li estis homo tre tolerema kaj neniel trudis al iu siajn konvinkojn - kiel en la vivo, tiel ankaŭ en la poezio. Liaj bonkoreco kaj honesteco gajnadis por li simpatian kaj estimon de ĉiuj homoj kun kiuj li rilatis, inkluzive min. Eble tiu estimo estos fonto el kiu naskiĝis **Preĝo*** - versaĵo kiun mi donacis al li je la okdekjariĝo.

Li estis arda muzikŝatanto kaj tiu sento fruktis per multegaj tekstoj al diversaj komponaĵoj - operaj arioj, kantoj koncertaj, societaj, naciaj, libreto por la opero **Jakobeno** de Antonin Dvojak, nu... - por diri breve - centoj da tekstoj.

Foje mi alparolis lin, ĉu li ne pensas pri "kolektitaj" aŭ almenaŭ "elektitaj" verkoj. Koĵinek ridetis embarasita.

- Kiu aŭtoro ne revas pri aperigo de siaj tekstoj? Sed rilate min la afero ne estas simpla. Eta antologio ne spegulus mian verkistan rikolton, eble eĉ misformus ĝin. Granda antologio? Nu, en tiu kazo necesus aperigi du volumojn. Sed kiu kapablus pagi la kostojn? Mi ne, ĉar mi ne havas tiom da mono. Pure Esperantaj eldonejoj ankaŭ ne kapablas, ĉar ankaŭ ili ne posedas sufiĉajn kapitalojn. Kaj pruntoj? Ĉu Esperantio kapablas ensorbi multekostajn eldonaĵojn? Cetere, ĝia libromerkato estas neorganizita. Ĉiam ĝi estis tia. Oni neniam ekpensis pri establo - far UEA - de delegitoj por libromerkato, ankaŭ la landaj asocioj ne faris tion en siaj estraroj.

- Fakte, ĉi tiu problemo ĝis nun ne estas solvita, sed verkistoj ne ĉesu verki pro tio. Ĉiu estu preparita por eventuala eldono, ja - mi ekŝercis - "ni scias nek la tagon, nek la horon..."

Koĵinek ridis.

- Vi estas optimisto.

- Ĉiam mi estis tia. Estante optimistoj ni almenaŭ strebas al io, pesimistoj eĉ ne strebas.

* **Preĝo** estas trovebla en la volumeto **Sopiro al puraj fontoj** kaj en "Espero Katolika" 1987/7.

- Ĝenerale jes, sed la abomena eldona situacio deprimas verkistojn, ĉi tion vi ne neos.

- Certe ne, oni ja ne neas evidentajn, ni tamen ne perdu esperon...

Venis neniun respondo. Sed mi fakte ne opinias ke Kojinek pesimismis. Li estis homo gaja, parolema, scivolema pri novaĵoj el la verda pamaso, ne persistanta konvinkadi pri sia ununura praveco. Nur por unu celi li ne taŭgis - se mi bone komprenas lin ĝenerale - nome: esti revoluciulo. Foje li firme ekriproĉis polojn (estis tempo de "Solidareco" kaj krepusko de la socialismo en Pollando): Kial ili strikas? Kial striki? Estas sensencaĵo!

Iom pli poste ĉeestinte la interparolon, Vondroušek tiris min flanken kaj diris:

- Pardonu, mi volas nur diri ke ne ĉiuj ĉefoj opinias same kiel Kojinek.

- Mi estas certa. Li ne komprenas ke strikon neniun volas, sed aliaj metodoj ne efikas.

- Evidente. Sen gravaj kaŭzoj la pola opozicio ne proklamas strikojn. Tiuj homoj ja ne estas idiotoj, ili konscias pri la ekonomia danĝero, sed kontraŭ la komunismo oni ne batalas en silkaj gantoj.

Kun Jiří Kojinek ni diskutis ankaŭ pri literaturaj revuoj de Esperantio. Li ĉiam pribedaŭris ilian efemerecon, baraktadon kontraŭ obstakloj, preskaŭ ekskluzive financaj, kaj ties sekvon: raran aperadon.

- Tiuj revuoj ne spegulas la literaturan vivon de la tuta Esperantio.

Mi konfirmis tion konvinkite:

- Preskaŭ ĉiam ia eta grupo de verkemuloj lanĉas propran revuon. Ilin boras deziro publikigi siajn tekstojn, mirigi la mondon per sia evidenta majstreco, akiri famon kaj plej altajn lokojn sur la verda pamaso. Se poste iliaj revoj kaj kredoj ne realiĝas, ili akuzas esperantisotajn, Esperantion, eĉ Esperanton. Dio mia! Gravaj aferoj, postulantaj profesion kompetentecon kaj sperton, ne povas realiĝi sole per bonaj intencoj de kelkaj revuoj!

Kojinek ne kontraŭstaris mian rezonadon. Supozeble - estante dudek jarojn pli aĝa - li havis spertojn samajn sed pli longajn kaj evidentajn.

Agrabla okazaĵo en nia amikeco kun Jiří Kojinek estis ricevo de

premio en UEA-konkurso. Jen en la jaro 1977, kadre de belarta konkurso de tiujara Universala Kongreso de Esperanto en Islando la duan premion por poeziaĵo oni aljuĝis *ex aequo* al Kojinek kaj mi. Li ricevis ĝin pro **Mezdecembra promeno**, mi pro **Ĝardeno**. Kun agrabla sento mi rememoras tiun detalon, ĝi ja ankoraŭ pli ligis nin reciproke.

Kiam mi ricevis de Hilda Kojinkova nekrologon pri morto de la edzo, mi ne volis kredi. Longe mi meditis super la folio kaj tra mia kapo fluis scenoj de niaj renkontiĝoj, diskutoj, serenaj babiloj malfruvesperaj, sonis eroj de liaj versaĵoj. Kiome li disfamigis la ĉefan poezion, portis ĝin en landojn, kiujn sen Esperanta versio ĝi neniam atingus! Sed ĉu oni apreziis tion sufiĉe? Satisfakciigis lin? Savis lian konvinkon ke la longa, streĉa peno ne estas vana, senbezona? Respondu tion lia lando.

En mia memoro li restas daŭre kiel homo honesta, afabla, laborema, neprofitema, senenvia, donacinta sian tutan literaturan talenton al la Internacia Lingvo, kaj konstruinta sian verkon sur firma maksimumo:

*Poeto, diru ĉiam veron,
ja tio estas via task',
ĉar vivas vi por paŝi teron
sen homa hipokrita mask'.*

"Panjo" kaj praha epizodo

La dua mondmilito interrompis miajn gimnaziajn studojn. Komence de la 1940-a jaro la germana laboroficejo (**Arbeitsamt**) sendis min devige labori en granda ŝtalfandejo Tjinec, kie mi komence estis helpa masonisto, poste helpanto ĉe fandeja forneĝo. Krom poloj laboris tie multaj ĉeĥoj, kaj ĝuste tiam miaj oreloj ekis adaptiĝi al la ĉeĥa lingvo. Supozeble tiam en mian menson falis la semo, el kiu poste elkreskis varma ŝato al la ĉeĥa kulturo, precipe al la literaturo, kaj ĝi vivas ĝis nun.

Dum la universitataj studoj mi partoprenis lektoradon, poste ekprovis traduki (Svatopluk Ĉeĥ, Jiří Volker, Jan Hus, Jan Neruda) kaj ankoraŭ pli poste naskiĝis la amikeco kun Jiří Karen, Eli Urbanova, Eva Semanova, Jiří Kojínek... Paralele, tra miaj manoj fluis multaj ĉeĥaj libroj. Tiamaniere venis vico por **Panjo** de Jaroslav Seifert.

Mirinda libro. Mi legis ĝin kelkfoje ĉeĥe, poste Esperante, kaj ĉiam demetis impresita, tavita per ĝia belo. **Panjo** estas por mi pruvo, ke simpleco estas esenca elemento de la belo. Tute nature, mi poste klopodis ekkoni ankaŭ aliajn verkojn de Seifert, kvankam je la pola eldono de liaj elektitaj versaĵoj **Odlowanie dzwonów (Fandado de sonoriloj)** nepris atendi ĝis 1990. Bedaŭrinde, tiu kolekto ne enhavas plenan **Panjo**, nur kelkajn versaĵojn, kaj en la libro oni eĉ ne notis ilian devenon. Do, **Panjo** plu atendas sian tradukonton kaj sian plenan aperon.

Estas evidente, ke kiam mi gastis en Praha, vibris en mi deziro vidi persone tiun ŝatatan poeton. Sed kiel? Iri vizite sen interkonsento - ne konvenis, telefoni - eĉ pli ne, fine aranĝis ĉion amiko mia, mem verkisto.

Sed tiu vizito ne estis granda problemo - Seifert ne pozis je grandulo, kondutis simple, tute sen pozemo, sen ia pretendo je omaĝo, tamen necesas mencii ke tiutempe li eĉ ne supozis ke la futuro alportos al li la Nobel-premion. Tio okazis multe pli poste.

Cetere, la vizito ne daŭris longe. Baldaŭ post eniro ni rimarkis ke Seifert estas malsaneta. Li preskaŭ senĉese sidis, moviĝis mairapide, spiris ne tute facile, sed la menson li havis absolute klaran. Post kelktempa interparolo li diris flatajn frazojn pri mia

orientiĝo en la ĉefia literaturo, kaj kontente surpriziĝis kiam, je lia demando, mi esprimis mian apartan ŝaton por Antonin Sova.

- Jes - li diris - Sova estis vere bona poeto, kvankam malfeliĉa.

- Malfeliĉa?

Responde je mia ekmiro Seifert rakontis kelkajn brevajn detalojn el la vivo de la citita poeto.

- Li estis bona poeto, ĉizanta, perfektiganta la formon. Krome, tre honesta homo. Sed estas nur mia persona opinio, ja ĉiu havas proprajn plaĉojn.

Seifert, denaska pragano, detale orientiĝis pri la vivo de la praga parnaso, eĉ en ties tute privata sfero, sed li rakontis honeste, delikate, ne eltiradis iujn sensaciajn spicaĵojn, krom se ili havis senduban rilaton kun la verkado kaj influis la verkojn mem.

- Ĉu vi ne emas veni iam Pollandon?

Seifert ekridetis.

- Nu, veni mi ĉiam dezirus sed mia koro ne permesas tion. Kaj, krome, vi scias kiel malfacile estas hodiaŭ vojaĝi eksterlanden.

Mi nur kapbalancis, konante bone la procedadon de la sekurecaj servoj. Sed ĉu oni rifuzus pasporton al tiel eminenta poeto? Mi ne kuraĝis demandi laŭte, ĉar li eble preferis ne suriri tiel glitan terenon.

- Kaj ĉu vi havas iun preferatan poeton?

Seifert denove ekridetis, kaj nur post pripenso respondis:

- Nu, ni havas multajn bonajn poetojn, ankaŭ **Devětsil*** riĉis je talentuloj. Sed koncerne vian demandon... nu, eble Vladimir Holan.

- Kaj rilate al **Panjo** - li daŭrigis - laŭ mia tiama intenco ĝi devetis esti laŭdo al mia patrino. Mi ne supozis ke ĝi akiros tian plaĉon kaj aprezon, kian ĝi akiris. *Habent sua fata libelli*.

- *Habent...* sed ĉi tiu verko meritas sian postan sorton. Estas miaflanke ne flato sed konvinko.

Post ankoraŭ dekkelkaj minutoj mi leviĝis sugestante ke estas tempo adiaŭi. Seifert ne oponis kaj ni - dankinte pro lia afabla konsento akcepti nin - forlasis lian hejmon.

Post jaroj, kiam venis sciigo ke Seifert ricevis la Nobel-premion,

* **Devětsil** forta grupo de prahaj poetoj kaj artistoj havantaj propran artprogramon

mi longe, kun sincera ĝojo, pripensis tiun fakton. Kiom ofte mi bedaŭris amare ke en lingvoj nemulte konataj je monda skalo la verkistoj estas iome forgesataj, subtaksataj, oni simple ne rimarkas ilin. Plifortigis mian suspekton en revua diskuto pri la Nobel-premio mem, kelkaj voĉoj eĉ emis subtaksi la kompetent-econ de la ĵurianoj. Kaj jen! Ili ne preteratentis poeton ĉeĥlingvan. Tiu premio defendis miajn estimon kaj fidon al la Nobel-komitato.

Ekde tiam ĝis nun, sur mia librobreto staras ĉeĥlingva **Maminka (Panjo)**, al kiu post kelka tempo venis la Esperanta versio de **Panjo**. Ambaŭ ne estas forgesitaj. Kaj mi firme memoras mian promeson, ke se mi sukcesos ankoraŭfoje veni al Praha, mi iros al la Kralupa tombejo kun granda florbukedo.

Opava festivalo

Anna Milatova el Tjinec ofte persvadis min partopreni foje Esperantan kulturan festivalon en Opava, kiun la opavaj esperantistoj organizis jam kelkfoje en la kadro de "Bezručova Opava" - tutsemajna solenaĵo omaĝe al la eminenta ĉeĥa poeto Petr Bezruč. Ŝi tiel persistis, ke fine en la jaro 1980-a mi decidis vojaĝi tien. Cetere, interesis min ne nur la Esperanta festivalo, sed ankaŭ la solenaĵoj al Petr Bezruč, ĉar komprenante la ĉeĥan lingvon mi legis tiun *poetam unius libri** en originalo kaj scivolis ekkoni pli detale lian vivon.

Bonŝance, en la sama jaro oni anoncis - ankaŭ enkadre de la Bezruč-festivalo - venon de alia eminenta ĉeĥa poeto Vilem Zavada, kies verkoj estos tie pritraktataj en aparta literatura konferenco. Do, miaflanke duobla gajno.

Opava tre taŭgas por kulturaj aranĝoj. Vasta sed kun nur iom pli ol sesdek mil loĝantoj, kun multaj ĝardenoj, skvaroj kaj silentaj anguloj, trankvila, ĝi ne fortimigas per grandurbaj bruoj kaj tumulto. Facile troveblas restoracioj, kafejoj, sukeraĵejoj, mi eĉ trovis tie agrablan vinjeton **Boží koutek**, "Dia anguleto". Dum komunisma regado!

La Bezruč-festivalon aranĝas ĉefe la Petr Bezruč-muzeo, memkomprene ne sola sed kunlabore kun diversaj institucioj, dum la Esperantistan Kulturan Festivalon akceptis inĝeniero Vlastimil Kočvara kun sia verda stabo. Nu, kun tiu stabo ne ĉio iras glate. Kočvara estas ege agrabla homo. Ne nur bona inĝeniero, sed ankaŭ konanto de humanismaj problemoj, li aranĝas artajn programojn, recitkonkursojn, teatrajn spektaklojn, koncertojn, eĉ apartenis al la ensemblo sursceniginta la teatraĵon de Vitezslav Nezval **Manon Lesko (Lescaut)**, memkomprene en Esperanta versio. Trankvile eleganta, ĝentila, li favorigas por si ĉiun, kun kiu li kontaktas. Mi neniam forgesos lian helpon kaj zorgon pri mi dum la festivalo.

Mi partoprenis la kvaran. Mariana Elenova el Sofio kantis ciganajn romancojn, Bojena Zborovska el Varsovio operetajn ariojn, Heiena Supova kun Vaclav Malij el Brno operariojn kaj kantojn de Antonin Dvořak, sed plej impresis min la unuaktora dra-

* *poeta unius libri* (lat) poeto de unu volumo

mo de Valdemar Vinaĵ **Ĉerande de abismo**. Ludis ĝin Eva Semanova el Praha laŭ reĝisorado de la aŭtoro mem. Kun ili ambaŭ mi interkonatiĝis persone kaj poste korespondis kelkan tempon. La vorto "kelkan" havas ĉi tie tristan konotacion*. Valdemar Vinaĵ, noblanima poeto kaj dramverkisto, kun kiu mi tiam babilis ĝis tarda nokto, permesis al mi traduki la dramon, sed poste interŝanĝo de tiutemaj leteroj ĉesis, kaj post kelka tempo mi eksciis, ke li malsanas. Bedaŭrinde la morbo montriĝis mortiga. Sciigo pri lia morto estis por mi vera bato. Mi perdis ne nur konsilanton spertan en la tradukado, sed ankaŭ novan, bonan, sinceran amikon.

Alia eminenta "homo de l' plumo", kiun mi renkontis tiam en Opava, estis Jiří Kojínek. Esperanto li fakte estis ekde 1922, sed traduki kaj verki li komencis nur post la dua mondmilito. En la tempo de la festivalo li havis jam sepdek kvar jarojn, sed korpe kaj, precipe, mense estis absolute forta. Li kaj lia edzino formis jam iom aĝan paron, kvankam la edzino estis pli juna, elegante aspektanta, kio cetere ne mirigis, ja li laŭ profesio estis eksperto pri teksaĵoj. La plej gravajn atingojn, same en verkado kiel ankaŭ en tradukado, li jam havis post si, sed lia sinteno absolute ne estis "suprennaza", male, li kondutis modeste, afable, eĉ kore. Ni babilis longe, dimanĉe ni kune iris en preĝejon, kaj de li mi eksciis, ke Vlastimil Novobilski, aŭtoro de skizoj pri la Esperanta literaturo, tiam - ŝajnas al mi - adjunkto, nun estas altemeja profesoro.

Feliĉa familio: Esperanton parolas la patro, la patrino, la filino kaj la bofilo. La du lastaj renkontiĝis ĉe iu konferenco aŭ tendaro esperantista, mi ne plu memoras ekzakte, sed mi memoras ke ĝuste tie pafis ilin Amoro per siaj sagoj.

Konante la poezian rikoltaĵon de Kojínek mi sugestis al li eldoni sian **Verkaron**, aŭ almenaŭ sufiĉe ampleksan **Elektitajn verkojn**. Nu, ideo bona sed de kie preni monon? Sama problemo, kiel en la tuta Esperantio! Sed mi ne forgesis tiun ideon kaj ankoraŭ nune, post dektri jaroj, mi serĉas konvenan okazon sugesti al iu kompetenta ĉeĥa esperantisto (mi pensas pri Jozef Rumler) kolekti ĉiujn tekstojn de Kojínek kaj fari ilin tajpaĵo prespreta. Neniuj scias, ĉu ne ekdisponos sin okazo kaj ebleco realigi tiun ideon, aktuale ligitan kun nur unu problemo - la mono.

En Opava dum la traktita Esperantista Kultura Festivalo mi inter-

* kromsignifon

konatiĝis ankoraŭ kun la pedagogo kaj verkisto Jiji Karen, kun Jan Lañ - gvidanto de pola studenta "koruso por malnova muziko" el Bidgoŝĉ, kun Jiji Handzlik - nun konata esperantlingva kanzonisto el Bielsko. Kaj, cetere delonge, mi opinias ke tiaj apartaj festivaloj de la esperantista kulturo ne nur donas al esperantistoj estetikan ĝuon, sed ili estas ankaŭ tre signifaj renkontejoj de esperantlingvaj artistoj, verkistoj, reĝisoroj, revuoj de la esperantista kulturo kaj stimuloj por ĝia plua evoluo.

ENHAVO

Al la legantoj....	3
Revelacio...	5
Virino eterne flamanta...	14
Serĉanto de la blua tono...	18
Onjo Anna...	23
Teatra motivo...	26
"Scienca Revuo"...	28
SEU en Gjula...	30
Virino riĉa je emocioj...	32
Tespisidino...	35
Pri ŝi nur admire...	53
Homo sen hipokrita masko...	58
"Panjo" kaj praha epizodo...	63
Opava festivalo...	66

Kazimierz Szczurek (Kazimjeŝ Ŝĉurek), 1925-2000, post matureca ekzameno en humanisma liceo studis filologion en la Krakova Universitato. Post magistrigo li instruis dek jarojn en sia liceo pri la polaj lingvo kaj literaturo, sed pro forta politika premo (fare de la tiama komunisma reĝimo) li rezignis pri instruado kaj transiris, post postulataj kromaj studoj kaj ekzameniĝo, en bibliotekon, kie li laboris ĝis emeritiĝo. Dum preskaŭ tuta tiu periodo li aktivis ankaŭ kiel publicisto kaj tradukisto.

Ekde la jaro 1960 li verkadis ankaŭ Esperante kaj pli poste tiu lingvo fariĝis lia ĉefa esprimilo, kvankam paralele li publicistis ankaŭ pollingve.

Li publikigis Esperante (krom multaj nelibroformaj tekstoj) jenon:

Kazimjeŝ Ŝĉurek, Lina Gabrielli: **Nuancoj** (Plejado, 1980). Poemaro.

Zofja Kossak: **Obseditaj de Dio**. El la pola tradukis kaj enkondukon verkis Kazimjeŝ Ŝĉurek (1989)

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Homoj, verkoj, ideoj** (1990)

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Penetre tra jarcentoj** (1991)

Kazimjeŝ Tetmajer: **Freneza Faŭno**. El la pola tradukis kaj enkondukon verkis Kazimjeŝ Ŝĉurek (1993)

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **La bibliofilio** (1991)

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Sopiro al puraj fontoj** (1995).

Poemaro. (Du eldonoj: la unua, bibliofila).

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Rakontoj ĉe kandela flamo** (Laŭte!, 1997). Vivhistorietoj.

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Vojaĝo tra flavaj folioj** (Laŭte!, felietone, 1999-2000). Eventoj kaj anekdotoj el la lando de la libro.

Kazimjeŝ Ŝĉurek: **Ĉaso je rememoroj** (Laŭte!, 2000).